


EL POPOLA ĈINIO

中國新道

9

1975





Riĉa Rikolto de Sukerkanoj (kolora lignogravuraĵo)

de Hju Juĉuan

Infanoj sane kreskantaj



Elementlernejoj de Mejiavu-brigado de Hanggou,
Ĝejiang-provinco, lernas pluki novajn tefoliojn.





Meteologia grupo de pekinaj elementlernejoj en observado helpate de instruistino

Hongki-infanĝardeno de Hiĉang-gubernio, Siĉuan-provinco, edukas infanojn ofte per bildoj kaj revoluciaj rakontoj.



Amatora Belarta Grupo de la Elementa Lernejo Vuhigen, Hunan-provinco





Korpokulturado ekde infaneco



Infanoj de Pekino decidas lerni de la heroa infano Pan Dongzi, heroeto de la filmo *Trembrilanta Ruĝa Stelo*, kaj fariĝi bonaj infanoj de la Partio.

Pri funkciado de lernejo kun malfermita pordo

Je mencio de lerneja eduko oni nature pensas, ke tio estas instruado de scioj en klasĉambro. Fakte, la nuna lerneja eduko en Ĉinio jam ne plu estas limigita en klasĉambro, sed vastigata en la tutan socion.

Lastatempe ni vizitis plurajn mezlernejojn de Pekino. Tie parto de la lernantoj, laŭ la instruaj planoj de la lernejoj, faras socian praktikon kaj studon en fabrikoj, komunumoj, trupoj kaj la fabriketoj kaj kultivejoj funkciigataj de la lernejoj. La instruado en kombino kun socia praktiko estas nomita "funkciado de lernejo kun malfermita pordo".

La nomita instrua metodo estas nova eduka sistemo ĝenerale aplikita de diversaj lokoj de Ĉinio en la Granda Proleta Kultura Revolucio, post kritiko al la reviziisma eduka linio kaj laŭ la instruado de Prezidanto Maŭ Zedong, ke **kun lernado kiel sia ĉefa tasko, la lernantoj devas samtempe lerni ankaŭ aliajn aferojn.** Laŭ tiu nova eduka sistemo ĉiu mezlernejano, krom lernado de kulturaj kaj sciencaj scioj en klasĉambro, devas uzi ĉiujare certan tempon por studi kaj sin hardi en socia praktiko. Tio estas nemalhavebla leciono por kulturi lernantojn en daŭrigantojn de la revolucia afero de la proletaro.

En la fabriketo funkciigata de la Pekina 31-a Mezlernejo bruas motoroj, jen kaj jen brilas sparkoj kaj pli ol cent lernantoj en laborvesto diligente faras praktikadon. La fabriketo kon-

sistas el laborejoj de aŭtomobila elektra cirkvita sistemo, maŝinpecoj kaj muntado de magnet-amplifiloj. La elektraj cirkvitaj sistemoj bezonataj de pekina aŭtofabriko en produktado de kamionoj kaj la kablaj kupliloj bezonataj de la Pekina Elektroproviza Buroo estas produktitaj de tiu fabriketo.

Nun plejparto de la pli ol 300 mezlernejoj en la urbo Pekino starigis malgrandajn fabrikojn, kiuj produktis sume pli ol 380 specojn de produktaĵoj de maŝinoj ĝis malgrandaj metalaĵoj en la pasinta jaro.

La funkciado de tia fabriketo ĉefe celas levi la politikan konscion de la lernantoj, kombini edukon kun produkta laboro kaj teorion kun praktiko kaj samtempe krei riĉaĵon por la ŝtato.

En iu laborejo de la fabriketo de la 31-a mezlernejo ni rigardis fizikan lecionon de mezlernejanoj de la tria klaso. Sidante ĉirkaŭ malmuntita elektra motoro lernantoj atente aŭskultis prelegon de la instruisto pri la strukturo kaj principoj de tiu maŝino. Dum la leciondonado la instruisto prenis jen tiun maŝinpecon, jen alian, poste demonstris kiel interligi la 6 elektrodojn antaŭ funkciigo per elektro. Post finiĝo de sia klarigo li petis lernantojn elmeti demandojn kaj postulis ilin fari la praktikon. Se iu eraris, do li aŭ aliaj lernantoj lin korektis ĉeloke.

Lernantoj diris ke tia instrua metodo estas bona, ĉar ĝi povas movi aktivecon de lernantoj kaj facile memori la lernitan scion en praktiko. Sed tia leciono estis donata senescepte en klasĉambro en la pasinteco. La fizika instruisto diris al ni, ke tiam instruisto inokulis librajn sciojn al lernantoj per prezento de formuloj sur nigra tabulo tute sen interligo kun praktiko. Jam sufiĉe bone estis, se instruisto faris klarigojn helpe de desegnaĵoj aŭ modeloj.


“Funkciado de lernejo kun malfermita por-do” kreis favorajn kondiĉojn por kombini teorion kun praktiko. Nun ne nur fizika leciono sed ankaŭ parto de kemiaj lecionoj povas kombiniĝi kun praktiko. En la agrikultura bazo de la pekina mezlernejo “La Unua de Oktobro” ni vidis, ke tie oni instruas teorion pri la diktaturo de la proletaro kombinate politikan lecionon kun aktuala klasbatalo en la kamparo kaj strikte kombinis instruadon pri agrikultura scio kun laboro de lernantoj sur eksperimentaj kampoj. Eĉ la instruado de la plej abstraktaj matematikaj scioj kombiniĝis tie kun konstruado de lernejaj domoj. Tie la du brikaj domoj estas mem projektitaj kaj konstruitaj de altklasaj mezlernejanoj sub direktado de la matematika instruisto kaj masonisto.

Komence kiam lernantoj aŭdis, ke ili lernu matematikon lige kun konstruo de domoj, ili dubis, ĉu oni povas ellerni matematikajn sciojn en domkonstruado uzante brikojn kaj cementojn.

Komenciĝis la projektado, tamen la lernantoj ne sciis, kian dikecon la muroj devas havi por subporti la pezon de la tegmento. La matematika instruisto do donis al ili koncernajn sciojn pri materiala dinamiko kaj kalkulado pri pezeco de tegmento kaj transdonado de forto. Por ellabori stereografiajn kaj sekcajn desegnaĵojn la lernantoj uzis lernitajn sciojn pri geometrio kaj desegnado sub direktado de instruistoj. Dum la konstruado ili uzis la teoremon de Pitagoro por fiksi la pozicion de la dombazoj. En ligo kun ĉiu paŝo de la praktika laboro koncernaj matematikaj scioj estis lekciitaj kaj dank’ al tio multe altiĝis la aktiveco de la lernantoj. Ili ne nur atente aŭskultis la prelegojn, sed ankaŭ legis nemalmultajn referencajn librojn laŭ bezono de la praktiko.

Tia instruado helpas la lernantojn akiri veran praktikan kapablon. Dank’ al praktika hardado iuj lernantoj ellernis manipuladojn kaj riparadon de ordinaraj ilmaŝinoj, aliaj instaladon de elektra linio kaj triaj kulturadon kaj selektadon de agrikulturaj plantaĵoj. Iuj lernantoj eĉ povas fari teknikan renovigon

Laboristo donas lecionon al lernantoj en fabriko.



aŭ kreon uzante la lernitan scion. Ĉio ĉi tio metis al la lernantoj bonan bazon por servi al la socialisma patrolando en la estonteco.

Tamen posedi klarecon kaj praktikan kapablecon ankoraŭ ne estas la tuta postulo al la lerneja eduko de Ĉinio. Por efektivigi la edukon linion ellaboritan de Prezidanto Maŭ Zedong, la lernantoj devas disvolviĝi ĉiuflanke, morale, intelekte kaj korpe kaj fariĝi laboruloj kun socialisma konscio kaj kulturo, ili nepre devas proksimiĝi al laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj en praktiko, lerni bonajn pensojn kaj kvalitojn de la lastaj kaj senĉese levi sian socialisman konscion.

Kelkaj lernantoj de la lernejo "La Unua de Oktobro" rakontis al ni pri ŝanĝo de ilia sentimento en praktika lernado de agrikulturo.

En la pasinta jaro la lernejo sendis parton de la lernantoj al iu porkbredejo en la kamparo por partopreni en fizika laboro por ke ili pli bone lernu penson de la laboranta popolo kaj fariĝu laboremaj. Antaŭ la ekiro, nemalmultaj el ili ne sciis kiel bredi porkojn, opiniante, ke tiu laboro certe estas tre interesa. Tamen dum purigado de porkstaloj ili ofte makulis siajn vestojn per porkofekajo pro malatento. Timante tion iuj lernantoj perdis entuziasmon pri tiu laboro. Rimarkinte ilian eraran penson porkbredistoj faris al



Lernantoj laboras en la fabriko funkciigata de sia lernejo.

ili paciencan edukon donante bonan ekzemplon. La porkbredistoj ĉiam prenis sur sin pezan kaj malpuran laboron kaj klarigis al ili pri la rilatoj inter la disvolvo de porkbredado, subteno al la socialisma konstruado kaj la plibonigo de la popola vivo, kaj ke junuloj devas bone daŭrigi la revolucion aferon kaj sin hardi en malfacila laboro. La vortoj de la bredistoj multe edifis ilin. Ili pensis, kial ili nur ŝatas porkaĵon bongustan sed abomenas malpuraĵon kaj timas laciĝon dum porkbredado. Ĉu tio ne ĝuste montras la distancojn

Lerni de veterana kamparano en legomkampoj



inter ili kaj laborantaj popolanoj en sentimento? Poste ili diligente lernis de la porkbredistoj kaj konkure prenis sur sin malpuran laboron por sin hardi en praktiko. Dank' al laboro de unu monato, al ilia penso okazis granda ŝanĝiĝo. Kun profunda kompreno ili diris al ni, ke sen partopreno en laboro oni ne povas scii, ke laborfruktoj estas malfacile akireblaj kaj sen kontaktiĝo kun la laboranta popolo oni ne povas lerni ilian bonan kvaliton.

Same kiel ili, multaj lernantoj en "funkciado de lernejo kun malfermita pordo" ĉerpis valorajn spiritajn nutraĵojn de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj. En fabrikoj ili lernis de laboristoj senegoismecon kaj firman klasan starpunkton de klaraj amo kaj malamo. En la popolaj komunumoj de la kamparo la revolucia spirito de komunumanoj en penigaj bataloj kontraŭ la naturo kuraĝigis kaj edukis ilin. En trupoj ĈPLA-anoj starigis por ili bonan ekzemplon per sia bona stilo de tutkora servado al la popolo kaj rigora disciplineco.

Nun, lerni de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kaj fariĝi ordinara laboruloj posedantaj kulturajn kaj praktikajn sciojn jam fariĝis deziro de la plejparto de la ĉinaj lernantoj. Ili ne plu estas tiaj lernantoj, kiuj sub la malnova eduka linio prenis studon kiel

Lerni enterigon de kontraŭtanka mino en trupo



rimedon por sin apartigi de fizika laboro dum la tuta vivo, sed diligente servas per la lernitaj scioj al laboristoj kaj kamparanoj jam en siaj lernoĵaroj.

En vintraj ferioj kelkaj lernantoj de la mezlernejo "La Unua de Oktobro" iris al montregiono nordokcidente de Pekino dorsportante mezurajn aparatojn por helpi iun brigadon mezuri teron. Ili ĝustatempe faris planan desegnaĵon de tero kaj per tio kreis oportunan kondiĉon por la brigado en laŭplana uzo de tero kaj akvoutiliga konstruado.

Ĉirkaŭ la Juegeĝuang-a Mezlernejo de Pekino estas produktaj brigadoj kiuj ĉefe produktas legomojn. Ĉiufoje kiam venis kreska sezono de legomoj, kelkdek specoj de fiinsektoj serioze minacis la legomojn. Por solvi tiun problemon, lernantoj kaj instruistoj de la lernejo unue pogrande produktis en sia fabriketo insektomortigajn lampojn kaj samtempe provfabrikis alian pli bonfikan lampon por tiu celo. Ĝi ellasas ultraviolajn radiojn, kiuj povas allogi flugantajn insektojn, kaj kiam tiuj tuŝis altensian dratreton kovrantan la lampon, ili ĉiuj estis mortigitaj. Per unu tia lampo oni povas ekstermi ĉirkaŭ 5 kilogramojn da fiinsektoj en unu nokto.

Fizika instruisto diris al mi, ke ili faris senĉesan plibonigon al tiu lampo por pli bone plenumi la bezonon de la kamparo. Kiam ili rimarkis, ke la altensia dratreto sur la lampo minacas ankaŭ la vivon de homoj kaj brutoj, ili provfaris aŭtomatan sekurigan aparaton, kiu povas aŭtomate rompi la elektrokurenton kiam homo kaj bruto proksimiĝas al la reto. Poste ili rimarkis ankaŭ, ke tre maloportune estas por kamparanoj malsalti lampon matene aŭ en pluva aŭ venta tago. Ili do provfabrikis ŝaltilon, kiu povas aŭtomate malsalti lampon en venta aŭ pluva tago kaj ĉe sunleviĝo. La nomita lampo trovis vastan bonvenigon ĉe la komunumanoj kaj produktiĝos pogrande en la fabriketo funkciigata de la lernejo. La malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj laŭdis tiujn lernantojn dirante, ke ili estas nova generacio kulturita laŭ la nova eduka sistemo.

Eksterlerneja edukado al geknaboj

LA geknaboj de la nova Ĉinio estas daŭrigantaj de la revolucia afero. Ili ricevas bonan edukon en lernejoj, tamen ilia eksterlerneja tempo estas tre multa. Kion ili faras tiam? Por respondi tiun demandon ni vizitis la eksterlernejan aktivan stacion de geknaboj de la loĝkvartalo Bejhinkiaŭ de Pekino.

I

Ni eniris en korton de laborista loĝejo kaj vidis grizharan avon rakontanta revolucionan historion al geknaboj, kiuj ĉiuj aŭskultis absorbite fiksante sian rigardon sur la vizaĝo de la avo.

Instruisto Guo akompananta nin diris al ni: “La avo, nomata Giang Juŝan, estas emerita laboristo. Li ofte edukas geknabojn per revoluciaj rakontoj. Tio estas unu el la metodoj de eksterlerneja eduko. La loĝkvartalo Bejhinkiaŭ havas multajn metodojn de eksterlerneja eduko al geknaboj. Krom rakontado de revoluciaj historioj, oni ankaŭ helpas ilin lerni revolucionan teorion, admonas ilin lerni de Lej Feng kaj organizas ilin por kulturaj, artaj kaj sportaj aktivadoj. Per tiuj aktivadoj oni faras al la geknaboj socialisman edukon kaj altigas ilian politikan konscion.”

La partia komitato de la loĝkvartalo Bejhinkiaŭ starigis multajn tiajn staciojn en sia tereno, en kiuj aktivigas 18,000 geknaboj.

Post lecionoj geknaboj venas al la stacioj, kie ili kelkope legas bildlibrojn kaj ĵurnalojn, aŭskultas rakontojn, saltas je kaŭĉuka ŝnuro, faras distraĵojn, ludas tablotenison, kantas aŭ dancas. Tiuj aktivadoj ŝatataj de geknaboj firme kaptas ilin.

En la 21-a korto de Nanhiaŭgie-strato loĝas 33 familioj kun 47 lernantoj de meza lernejo kaj elementa lernejo. Laŭ la aĝo kaj ŝato de la geknaboj, ĝia stacio starigis du grupojn de lernado, kritikado kaj unu artan propagandan grupon. Tie oni starigis malgrandan bibliotekon, kies libroj estas liveritaj plejparte de la geknaboj kaj cetere de la loĝkvartalo. La propaganda grupo povas mem verki kaj prezenti kulturajn kaj artajn programojn. Ni pririgardis la ĉambron por aktivado de la geknaboj. En negranda ĉambro, oni aranĝis murgazetojn kun la titoloj “Kritikado”, “Lernado” kaj “Kreado de Infankanto”, en kiuj estas multaj artikoloj kaj kulturaj kaj artaj verkoj skribitaj de geknaboj. Ili multe interesis la vizitantojn.

Tiaj eksterlernejoj aktivadoj de geknaboj jam disvolviĝis en Pekino kaj multaj aliaj urboj kaj vilaĝoj de nia lando.

En la nova Ĉinio ĉiuj 7-jaraj infanoj havas ŝancon viziti lernejon. La sana kresko de la geknaboj dependas ne nur de la edukado en la lernejo kaj la hejmo, sed ankaŭ de la socio. Knabeco estas tempo de korpokreskado kaj de akiro de scioj, kaj estas grava tempo de formiĝado de mondkoncepto. Geknaboj amas lernon kaj laboron kaj povas rapide sin akomodi al novaj aferoj. Sed aliflanke ili estas facile influeblaj de burĝara ideologio pro juneco kaj nematura kapablo de distingado. Por ke la geknaboj povu sane disvolviĝi en moralo, intelekto kaj korpo, feliĉe kresku en la sunlumo de la Partio kaj fariĝu daŭrigantoj de la proletara revolucia afero, oni ne nur devas instrui al ili sciencajn sciojn kaj komprenigi al ili revolucionan teorion en lernejo,

sed ankaŭ devas doni bonan edukon al ili ekster la lernejo.

II

En nia lando oni tre zorgas pri la kreskado de la infanoj. En multaj urboj kaj vilaĝoj emeritaj laboristoj, malriĉkampanoj, malsuperaj mezkampanoj, soldatoj de la Ĉina Popola Liberiga Armeo kaj aliaj estas tre volontaj direkti infanojn en ilia agado post lecionoj. En la loĝkvartalo Bejhinkiaŭ pli ol 1,500 ofi-cistoj, emeritaj laboristoj, veteranaj instruistoj, soldatoj kaj aliaj urbanoj senrekompence partoprenas en direktado al infanoj post lecionoj. Ili aktive helpas lernejojn kaj gepatrojn en eksterlerneja edukado al geknaboj. Pro tio ili estas multe laŭdataj de la instruistoj kaj gepatroj de la lernantoj.

En la vizito ni intervjuis eminentan direktantinon Liu Julan, 70-jaran komunistinon kaj estron de komitato de loĝantoj. Ŝi estas sana, serena kaj parolema. Ŝi diris, ke la gejunuloj kaj geknaboj estas la estonteco de la nova Ĉinio kaj la espero de la revolucio, ke zorgi ilian kreskon estas la devo por ĉiuj


civitanoj. Eduko al geknaboj similas al kulturado de floroj kaj bezonas paciencon. Oni devas ofte edifi ilin per revolucia teorio. Sekve ŝi rakontis al ni jenan historion.

Antaŭ nelonge kelkaj lernantoj de la kvina klaso de la Elementa Lernejo Bejhinkiaŭ ne venis al la lernejo en pluraj sinsekvaj tagoj. Tion rimarkis Liu Julan. Ŝi faris viziton al la hejmoj de la lernantoj por helpi instruistojn de la lernejo. Poste ŝi venis al la lernejo kaj, ligante la lernatan tekston "Donu al Mi Pafilon", rakontis al la geknaboj pri sia travivaĵo en la Kontraŭjapana Rezistmilto: Tiam ŝi kaj la amasoj portadis brankardon, transportis kontingentan grenon kaj ŝirmadis soldatojn de la Okavoja Armeo, kaj vidis multajn heroaĵojn de kuraĝaj kaj sinoferemaj soldatoj de la Okavoja Armeo. Ŝia rakonto donis al la geknaboj vivecan politikan lecionon kaj komprenigis al ili, ke la hodiaŭ feliĉa vivo estas gajnita de revoluciaj antaŭuloj post penega batalo. La lernantoj, kiuj forestadis sen permeso diris: "Ni estas revoluciaj posteuloj kaj nepre devas efektiviĝi la deziron de revo-

Legi bildgazeton



Geknaboj provludas



luciaj martiroj, diligente lerni kaj daŭrigi la revolucion.”

Ni vizitis la hejmon de Guo Ĝi. Li estas triaklasa lernanto de la Pekina 79-a Mezlernejo kaj estis antaŭe fama petolulo. La eksterlerneja direktanto multe klopodis por korekti lian malbonan konduton kunagante kun la lernejo kaj liaj gepatroj. Sciiginte pri la mizera historio de lia familio, la eksterlerneja direktanto petis lian avinon rakonti al li pri la suferitaj ekspluatado kaj subpremado de kapitalistoj kaj afliktiĝo pro neinstruiteco en la malnova socio. Lia patrino rakontis al li pri sia kolektado de rubaĵoj kaj almozpetado en sia infanaĝo. La klasa edukado per komparo de la nova socio kun la malnova forte tuŝis lian koron. Cetere la eksterlerneja direktanto postulis, ke liaj kunlernantoj en la korto ne evitu lin sed intimiĝu kun li, helpu lin en lernado kaj invitu lin partopreni en aktivado de la stacio. Ekde tiam li ne nur lernas diligente, sed ankaŭ faras dommastrumaĵojn, iniciate purigas la korton kaj helpas maljunulojn aĉeti bezonaĵojn. Ĉiuj ĝojas pro lia ŝanĝiĝo.

En la 9-etaĝa dombloko N-ro 14 de Bejguanting, loĝas knabo Hiaŭhua, kies gepatroj ambaŭ laboras. Li estis kromnomata “Bubaĉo”. Maljunaj laboristoj en tiu domo, kiuj estas eksterlernejaj direktantoj por la infanoj, kulturis novan generacion por la revolucio, same kiel soldatoj de la Ruĝa Armeo kulturis Pan Dongzi (malgranda heroo en la filmo «Trembrilanta Ruĝa Stelo»). Dank’ al pacienca edukado de la emeritoj, Hiaŭhua multe ŝanĝiĝis en sia konduto. Iufoje, oni okazigis en la domo artan prezentadon, kaj al la danco “Vestolavado” mankis ludanto de la rolo de soldato. Hiaŭhua iniciate anoncis sin por ludi la rolon. Sub helpado de geonkloj-laboristoj, li komprenis ke por bone ludi la rolon de ĈPLA-ano, oni unue devas bone lerni de ĈPLA-ano. Krom kolektiva ekzerco li ankaŭ pene ekzercis sin en la hejmo kaj li bone plenumis sian taskon.

III

Dank’ al la edukado en kaj ekster la lernejoj, la geknaboj de la loĝkvartalo Bejhinkiaŭ

programeron verkitan de ili mem.



Avino Liu Julan helpas geknabojn en studo de revolucia teorio.



sane kreskas. Ili diligente lernas, fervore laboras, amas kolektivon, kuraĝas en batalo kontraŭ malbonuloj kaj inter ili senĉese aperas bonaj homoj kaj bonaj aferoj. Jenaj aferoj montras la superecon de la eksterlerneja eduko.

En iu korto de la strato Nanhiaŭgie loĝas malbonulo, kiu intencis korodi kaj forlogi gejunulojn kaj geknabojn per burĝara ideologio. Foje li venigas kelkajn infanojn al sia hejmo kaj prezentis al ili trivialajn librojn. La infanoj tuj rifuzis kaj raportis tion al la eksterlernejaj direktantoj. He Ping, estro de la Ruĝa Gvardio de la lernejo kaj lernanto de dua klaso de supera mezlernejo, frue rimarkis ke la malbonulo intencas inokuli al la infanoj feĉojn de feŭdismo, kapitalismo kaj reviziismo sub la ŝildo de zorgo al infanoj. He Ping vidis ke tio estas batalo por gajni la novan generacion. Subla helpo de la eksterlernejaj direktantoj, ili okazigis kunvenon de gejunuloj kaj geknaboj de la tuta korto. En la kunveno geknaboj unu post alia malkaŝis kaj kritikis

Geknaboj legas en kultura stacio de loĝkvartalo.



la malbonulon. Antaŭ grandnombraj faktoj, la malbonulo ne povis ne konfesi sian krimon.

Dong Ĵong estas lernantino de unua klaso de la elementa lernejo Jongĝong en la loĝkvartalo kaj estas kripla je la piedoj. Ŝiaj gepatroj havas laboron kaj ĉiutage ŝia avino veturigis ŝin al kaj el la lernejo per malgranda ĉaro. Inspirite de la spirito de Lej Feng, ŝiaj kunlernantoj Vu Tong, Gaŭ Gjunmej k.a. ĉiumatene venis al ŝi por ŝin helpi. En la lernejo ili tre zorgas ŝin kaj reportas ŝin hejmen post lecionoj. Instruisto Ĝang, kiu akceptis nin, diris: “Kvankam Dong Ĵong estas kripla, tamen la amo de ŝiaj kolegoj kuraĝigas ŝin al diligenta lernado kaj ŝi ĉiam estas inter la plej bonaj en lernado.” Ŝia avino ofte danke laŭdas ilin: “La nunaj geknaboj ja estas bonaj. En infanaĝo ili jam estas tiel helpemaj kaj ili certe povos bone daŭrigi la revolucionan aferon en la estonteco.”

En septembro de la jaro 1974, Ma Gin, lernanto de kvina klaso de la elementa lernejo Bejhinkiaŭ trovis monujon en kinejo. Li malfermis ĝin kaj vidis en ĝi pli ol 60 juanojn kaj deponateston. Li pensis, ke la perdinto certe estas tre maltrankvila kaj tuj iris al servistoj por ke ili serĉu la perdinton. Post duonhora, maljuna laboristo haste revenis por serĉi la monujon. Kiam la servisto donis al li la monujon, li nenion povis diri pro ekscitiĝo. En la sekvanta tago la maljuna laboristo venis al la lernejo kunportante dankan leteron kaj donacon. Vidinte Ma Gin li ĝoje diris: “Vi ja estas bona knabo kulturita de Prezidanto Maŭ!” Li prezentis la donacon al Ma Gin, sed Ma Gin neniel akceptis. Oni demandis Ma Gin, kial li ne akceptis la donacon. Li respondis: “Redoni la perdajon estas mia devo kaj akcepti la donacon estas ne dece.”

En la lastaj jaroj, la lernantoj en la loĝkvartalo Bejhinkiaŭ trovis diversajn objektojn, ekzemple oran brakhorloĝon, monon, vestaĵojn, butonon, groŝojn kaj ĉiujn trovitajn perdajojn ili donis al siaj lernejoj aŭ al la geknabaj stacioj. Loĝantoj laŭdis ilin ke ili estas bonaj daŭrigantoj de la revolucia afero.

Infanoj verkas novajn infankantojn

*Ĉu ruĝa mur' aŭ griza muro, ĉiu iĝas batalkampo,
sur ĝi, konkure ruĝgvardianoj publikigas, kun pasio,
infanajn kantojn, bildojn, ĉiujn tranĉajn kiel sabro,
pli ardas la kritika fajro kontraŭ Lin Biaŭ, Konfucio.*

Enirinte en la Elementan Lernejon Hisibej situantan en movoplena kvartalo de Pekino, mi trovis min kvazaŭ en oceano de infankantoj. Ĝuste kiel la supre citita infankanto montras al ni, en tiu ordinara lernejo, ekstere aŭ interne de la klasĉambroj pleniĝas de multaj algluitaj infankantoj aŭ paperpendaĵoj kun surskribitaj infankantoj kaj sur la ludplaco ŝvebas ĝojaj kantoj kaj ridoj de geknaboj. Instruistino Kang, kiu min akompanis, diris al mi, ke la novaj infankantoj, kantataj aŭ publikigitaj sur la muroj, ĉiuj estas verkitaj de geknaboj. Antaŭ nelonge, la pli ol 600 gelernantoj de la lernejo kunvenis por prezenti revoluciajn infankantojn de ili mem verkitajn. La formo de la prezentado estis tre varia kaj vigla.

Montrante la naivajn infanojn en la lerneja korto, la instruistino diris al mi en ekscitiĝo, ke de pli ol unu jaro, ili jam verkis pli ol dek mil infankantojn sub la direkto de la instruistoj. Tiuj infankantoj spegulas, per freŝa kaj klara infana lingvo, la amon de la ruĝaj gvardianoj al la hodiaŭa feliĉa vivo kaj ilian re-

volucian spiritan fizionomion de zorgado pri la gravaj ŝtataj aferoj kaj kuraĝa partopreno en klasbatalo de la socio kaj esprimas ilian altan volon nepre fariĝi daŭrigantoj de la revolucia afero de la proletaro.

La geknaboj de la Elementa Lernejo Hisibej komencis verki novajn infankantojn en 1974, kiam la Movado de Kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio arde disvolviĝis tra la tuta lando.

En la komenco de la nomita jaro, iu instruisto trovis ke inter la lernantoj cirkulas malbona infankanto pledanta por la ideo "lernadi por fariĝi superreganto", kiu prezentas reakcian penson de ekspluatanta klaso propagandatan de la naciperfidulo Lin Biaŭ kaj de Konfucio, Mencio k.s. de du jarmiloj. La partia filio de la lernejo donis eksterordinaran atenton al tio, opiniante ke ĝi estas speguliĝo de la socia klasbatalo en la lernejo, ke tio montras ke la burĝaro klopodas konkuri kun la proletaro por gajni al si la geknabojn. La reakcia klaso intencas korodi la geknabojn per tiu dekadenca penso kun la espero, ke ili strebos al fariĝo de grandaj sinjoroj kaj ekspluatantoj arogante rajdantaj sur la popolo. La partia filio speciale diskutis pri tio kaj decidis, ke la geknaboj partoprenu en la Movado de Kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio kaj la socia klasbatalo per verkado de revoluciaj infankantoj por pint-kontraŭ-pinte batali kon-

traŭ tio, por ke ili komprenu, en kio la dirita infankanto estas malbona.

Prenante la malbonan infankanton kiel instruon materialon de negativa ekzemplo, la lernejo helpis la geknabojn studi la gravajn instrukciojn de Prezidanto Maŭ pri eduko en servo al la politiko de la proletaro, kombino de edukado kun produkta laboro kaj kombiniĝo de intelektaj junuloj kun laboristoj kaj kamparanoj per vivado kaj laborado inter ili kaj gvidis ilin partopreni en kolektivaj produktaj laboroj en kamparo ĉirkaŭ la urbo por akcepti edukadon de la malriĉk kamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, por ke ili amu laboron kaj la laborantan popolon ekde sia infaneco. Dank' al tia viveca edukado, la kono kaj kompreno de la geknaboj profundiĝis paŝopostpaŝe. Vang Lin, lernantino de la kvara klaso, rememoris la adiaŭadon al la pliaĝa fratino kaj ties kunlernantoj okaze de ilia forveturo al kamparo por fiksloĝiĝi tie post ilia diplomitiĝo el mezlernejo: Iliaj samlernejoj alpinglis sur ilia brusto grandan ruĝan floron kaj iliaj gepatroj, parencoj kaj amikoj ilin adiaŭis amase starante ambaŭflanke de la strato. Ŝia fratino kaj ties kunler-

nantoj ĝoje veturis al la kamparo en tamtamado kaj tamburado. Vang Lin verkis infankanton pri tiu viveca sceno.

*Hodiaŭ franjo forveturos,
sur ŝia brusto brilas granda ruĝa flor';
ŝi revoluciados en kamparo
laŭ instrukci' de Prezidanto Maŭ.
"Rapide kresku, fratineto,"
al mi ŝi diris kore je la adiaŭ',
"kritiku kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio
kaj plenkreskinte ankaŭ vi laboru en
kampar'."*

Mi tuj respondis:

*"Nin ruĝgvardianojn gvidas granda
ideal'.*

*Kiam konstruos ni kamparon la patrian,
ni vetu, kiu superos kiun en kontribu-
far'."*

La nova infankanto verkita de Vang Lin tuj ricevis laŭdon de la partia filio kaj la instruistoj kaj ĝi estis aperigita en la mimeografita organo de la lernejo. La partia filio alvokis la ruĝajn gvardianojn ke ili imitu sian samlernejanon Vang Lin kaj ankaŭ verku novajn infankantojn.

Prezentado de kantoj verkitaj de la infanoj mem.




Baldaŭ poste fondiĝis grupoj por verki novajn infankantojn unuj post aliaj en ĉiuj klasoj de la Elementa Lernejo Hisibej. Ili vaste disvolvis aktivadon de verkado de revoluciaj infankantoj utiligante la megafonon kaj la formojn de murgazeto, nigratabula gazeto, dazibaŭo kaj deklamkunveno de infankantoj en la lernejo.

Por levi la nivelon de pensenhavo de la infankantoj kaj helpi la geknabojn iom koni Marksismen ekde ilia infanaĝo, la partia filio helpis organizi inter ili pli ol 50 studrondojn de revolucia teorio. Dank' al tio plialtiĝis la batala karaktero de la novaj infankantoj de ili verkitaj.

Kamaradino Kang informis min pri infankanto verkita de Ven Hong, 11-jara lernantino de la kvara klaso.

Foje, Ven Hong kaj ŝiaj kunlernantoj vizitis ekspozicion pri klasbatalo en ligo kun lernata leciono. Tie ŝi vidis fotojn kaj objektojn pri kruelaĵoj de servutul-mastroj de Tibeto antaŭ la demokratia reformo, ke ili elprenis la okulglobojn de servutuloj, dehakis iliajn manojn aŭ piedojn kaj faris bovlojn el iliaj kranioj. La sangaj faktoj memorigis al Ven Hong pri la travivaĵo de ŝia avo kiun rakontis al ŝi ŝia patrino. Antaŭ la Liberiĝo, la avo de Ven Hong laboris kiel sekretario de la distrikta partia komitato. En iu tago, li kaj la vilaĝanoj subite estis ĉirkaŭitaj de reakcia trupo de Kuomintango. Por ŝirmi la amason en trompo de la sieĝo ŝia avo malfeliĉe estis kaptita de la reakciuloj kaj enterigita viva. La tirana bienulo, kiu pretendis esti "bonfaranto", elfosis la kadavron de ŝia avo kaj hakis ĝin en tri pecojn.

Tion pensante malgranda Ven Hong ekklarimis nereteneble. Ŝi pensis: Kiel kruelaj estas la klasaj malamikoj! Sed Konfucio kaj liaj sekvantoj propagandadis la absurdan tezon, ke "origine la homoj havas bonan koron"; Lin Biaŭ revadis renversi la diktaturon de la proletaro de nia lando kaj restaŭri kapitalismon,



Instruisto helpas geknabojn en verkado de infankantoj.

por ke la laboranta popolo denove dronu en mizero, sed li distrumpetis pri "traktado de aliuloj kun homama koro". Ĉu ĉio tio ne estas mensogoj?

"En la mondo certe ne ekzistas senkaŭza amo, nek senkaŭza malamo." Tiu instruo de Prezidanto Maŭ akriĝis la okulojn de Ven Hong kaj iom post iom ŝi komprenis, ke amo kaj malamo havas klasan kriterion kaj absolute ne ekzistas la t.n. denaska "bonkoreco". Kaj ŝi verkis jenan infankanton:

La ruĝgvardianoj estas netrompeblaj per babilaj', ke l' homoj "origine havas bonan koron".

La bienuloj babiladas pri bonfaro, sed pelas malriĉulojn en mizeron kaj doloron.

Kriaĉas same la reakciuloj, kiuj sen palpebrum' masakras la polon.

...

Same kiel la lernantoj aliloke, tiuj de la Elementa Lernejo Hisibej lernas ne nur inter-



ne de la lernejo sed ankaŭ en la vasta socio, nome lerni en ĝi industrian produkton, agrikulturon kaj militan arton. En tiuj aktivadoj, la geknaboj ne nur estas hardataj en penso, plivastigas sian horizonton, sed ankaŭ riĉigas la enhavon en sia verkado de infankantoj.

En printempo ĉijare la lernantoj de tiu lernejo venis al la popola komunumo Sigiking en antaŭurbo de Pekino por lerni tie agrikulturon. Ili helpis la komunumanojn en rikolto de florbrasikoj kaj forigo de herbaĉoj. Reveninte al la lernejo, la lernanto de la kvina klaso Ĝang Jibin priskribis la laboremon de la ruĝaj gvardianetoj, komparante ilin kun diligentaj abeloj:

*Etaj abeloj zumas ĥore,
ruĝaj gvardianetoj venas lerni kamplaboron
en antaŭurbo. Florbrasikojn ili portas
tre fervore,*

kaj ridas onkloj de la komunumo en la koro.

*Etaj abeloj zumas ĥore,
ruĝaj gvardianetoj venas lerni kamplaboron
en antaŭurbo. Por sarkadi legomkampojn,
rolon ili ekludas
energie kaj fervore.*

...

En tiu elementa lernejo mi havis okazon interparoli kun veterana instruisto, kiu okupiĝis pri edukado jam dekojn da jaroj. Li diris al mi emocie: "Ke infanoj dekunu-aŭ dekdu-jaraj povas verki tiel bonajn versojn, tio estas rezulto de la eduka revolucio. Kiel ili povus verki tiajn infankantojn antaŭe, kiam la reviziisma linio regis en edukado, la lernantoj fermitaj en la malvasta lernejo sin okupis nur pri legado, ne povis distingi la grenplantojn, ne zorgis pri la gravaj aferoj en kaj ekster la lando kaj sin apartigis de la socia praktiko?"

Vizito al regiono plagita de tertremo

EN la 4-a de februaro de la kuranta jaro okazis forta tertremo de 7.3 gradoj en Hajĉeng kaj Jingkoŭ en la suda parto de Liaŭning-provinco de nia lando. Kiam mi venis tien en la komenco de junio postskuoj ankoraŭ daŭris, temen antaŭ mi prezentiĝis kortuŝa sceno de batalado de la popolo en la plagita regiono kontraŭ la katastrofo por rekonstrui siajn hejmlokojn. Oni multe parolis al mi pri la tertremo okazinta en la kvara de februaro. Nemalmultaj homoj diris kun dankemo: “Se ne estus antaŭinformo pri la granda tertremo, kiom da homoj devus morti!”

Fakte ja tiel estis. Se ne estus la forta gvido de la Partio kaj registaro kaj relative ĝustatempa kaj preciza antaŭinformado pri la tertremo fare de la sismologiaj laborantoj kaj amatoraj sismobservaj grupoj de la amasoj, neimagebla estus la sekvaĵo de tiel granda tertremo.

Kiel oni observadis kaj antaŭinformis la menciitan tertremon? Mi devas rakonti ekde la pasintaj tertremoj de Ĉinio.

Ĉinio estas lando abunda je tertremoj. Laŭ historia literaturo de pli ol 3,000 jaroj, en tiu

Membroj de la urba partia komitato de Jingkoŭ studas pri stato de la tertremo en suda parto de Liaŭning.





Helpate de ĈPLA-anoj la Sismo'logia Stacio de Jingkoŭ tagnokte persistas en observado kaj antaŭinformado pri tertremo.

periodo okazis sume pli ol 3,000 sentebraj tertremoj. En la batalo kontraŭ damaĝoj kaŭzitaj de tertremo la laborantaj popolanoj de nia lando akumulis riĉajn materialojn kaj valoran sperton pri preventado de ĝia detruo. Sed sub la putra regado de la reakciaj klasoj de ĉiuj dinastioj la saĝo de la vasta laboranta popolo ne povis plene disvolviĝi, kio serioze malhelpis la progreson de sismologio en Ĉinio. En la periodo de la reakcia regado de Kuo-mintango nek la sismologia laboro nek la suferoj de la laborantaj popolanoj kaŭzitaj de tertremoj estis zorgitaj. Tiam en la tuta lando troviĝis nur unu sismologia stacio kaj tri sismologiaj laborantoj. Post la Liberiĝo, dank' al la granda zorgo de la Komunista Partio de Ĉinio kaj la popola registaro, la sismologia laboro de nia lando ricevis grandan disvolviĝon. Precipe post la kritikado en la Granda Proleta Kultura Revolucio al la kontraŭrevolucia reviziisma linio de Liu Ŝaŭki, kompradora filozofio, la specialista linio kaj la teorio pri "nekonebleco de tertremo", la sismologia laboro ankoraŭ pli impete disvolviĝis.

En la jaro 1966, en Hingtaj-regiono de Hebej-provinco de Ĉinio okazis detruiva tertre-

mo. Prezidanto Maŭ Zedong kaj la Centra Komitato de KPCĈ tre zorgis pri la popolanoj de la plagita regiono. De tiam la ĉina sismologia laboro havis ankoraŭ pli grandan disvolviĝon kaj la vicaro de sismologiaj laborantoj rapide kreskis.

ANTAŬINFORMADO DE SISMOLOGIAJ FAKULOJ KAJ AMASOJ EN KOMBINO

Kamaradoj de la sismologia fako rakontis al mi pri la antaŭinformado pri la lasta tertremo en suda Liaŭning.

En 1969 okazis granda tertremo en Bohajgolfo. Laŭ la pasintaj sismoregistroj en la historio, la centro de tertremo tendencas moviĝi al la nordoriento, en la suda parto de Liaŭning okazis granda tertremo en la pasinteco kaj nun ankoraŭ ekzistas signoj de tertremo, la Tutlanda Konferenco pri Sismologia Laboro de 1970 difinis Liaŭdong-duoninsulon kiel danĝeran regionon de tertremo.

Laŭ materialoj akiritaj de la sismologiaj stacioj kaj observaj grupoj la Ŝtata Sismologia

Buroo okazigis konferencon en 1974 por diskuti la sisman situacion de norda Ĉinio kaj la regiono de Bohaj-golfo. Ĝi studis materialon pri anomalioj de la suda parto de Liaŭning kaj konstatis, ke anomalio okazis al tieaj tertremo kaj flusoj kaj rimarkinde multiĝis malgrandaj tertremoj. La konferenco konkludis, ke en la norda parto de Bohaj-golfo eble okazos relative granda tertremo en la venontaj 1-2 jaroj.

Sub tia cirkonstanco Liaŭning-provinco vaste propagandis sciojn pri tertremo kaj mobilizis amasojn por fari observadon kaj informadon.

En januaro de 1975 la Ŝtata Sismologia Buroo okazigis kunvenon, kiu analizis kaj esploris la anomaliojn prezentitajn de Liaŭning kaj klare montris, ke en la unua duonjaro eble okazos tertremo de ĉirkaŭ 6 gradoj en la zono de Jingkoŭ ĝis Ginhian en Liaŭdong-duoninsulo kaj faris mallongaperiodan antaŭinformadon pri okaziĝo de tertremo.

Je la 28-a de januaro de 1975 la sismologia fako de Liaŭning-provinco kunvokis respondeculojn de sismologiaj stacioj en Pangin,

Jingkoŭ, Ljuda, Dandong k. a. al urĝa kunveno por analizi nenormalajn fenomenojn kaj montris, ke en la proksima estonteco eble okazos relative granda tertremo en la suda parto de Liaŭning.

En la 1-a de februaro ekaperis malgrandaj tertremoj en Hajĉeng kaj Jingkoŭ. En la 3-a de februaro malgrandaj tertremoj draste multiĝis kaj ĝia frekvenco kaj intenseco senĉese altiĝis. La sismologia stacio de Ŝipengju de Jingkoŭ raportis sian opinion pri tuja okaziĝo de granda tertremo al la supera instanco laŭ la malgrandaj tertremoj kaj anomalioj de grunda kurento, animaloj kaj putakvo, rimarkitaj de la amatoraj sismologiaj observejoj.

Laŭ la raportoj de diversaj lokoj la Revolucia Komitato de Liaŭning-provinco elsendis al la tuta provinco antaŭinformon pri tuja okaziĝo de granda tertremo je tridek minutoj post la deka de la 4-a kaj postulis, ke oni tuj apliku kontraŭrimedojn.

La antaŭinformo pri tiu tertremo estis kompare preciza, kaj tio estas neapartigebla kun la amasa observado kaj antaŭinformado. Multaj komunumoj, brigadoj, institucioj, fa-

Sub la profunda zorgo de Prezidanto Maŭ kaj la Centra Komitato de la Partio, la popolanoj de la plagita regiono decidis energie rekonstrui la hejmlokon.



brikoj, minejoj, lernejoj, trupoj, meteorologiaj stacioj kaj poŝtejoj de Liaŭning-provinco starigis siajn amatorajn sismologiajn observejojn.

Mi vizitis amatoran sismologian observejon de Huĝuang-komunumo de Jingkoŭ-gubernio.

En tiu sismologia observejo estas nur 3 junaj telefonistinoj, inter kiuj la plej aĝa estas 22-jara. Tie mi intervjuis la grupestrinon Vu Ĉunhia.

Ŝi diris, ke helpate de la sismologia stacio ili mezuradis grundan kurenton per simpla aparato. En normala stato la grunda kurento sin trovas en relativa stabileco. Tamen en formiĝo kaj disvolviĝo de tertremo povas aperi anomalio de grunda kurento en iuj lokoj. Tial observado de anomalio de grunda kurento helpas antaŭinformadon pri tertremo.

Dum kvar sinsekvaj jaroj ili ĉiam atenteme observadis grundan kurenton, notis ĝiajn ŝanĝojn kaj informis tion al la sismologia stacio per telefono. Krome ili profitis la ŝancojn de vizitado al uzantoj de telefonoj por propagandi al la amasoj sciojn pri tertremo.

Antaŭ okaziĝo de la granda tertremo ili ĝustatempe rimarkis anomalion de la grunda

kurento. Laŭ tiu fenomeno ili konstatis, ke tio estas antaŭsigno de granda tertremo kaj tuj raportis tion al la sismologia stacio.

Samtempe kun tio ankaŭ aliaj observejoj raportis multajn nenormalajn fenomenojn, ekzemple, serpentoj elrampis el truoj en la temperaturo de pli ol 10°C sub la nulo, ratoj transloĝiĝis, hundoj senkaŭze bojis, fiŝoj elsaltis el akvosurfaco kaj aro kaj aro da anseroj fluge leviĝis dekelkajn metrojn kaj ŝvebis 100-200 metrojn.

La granda kvanto da nenormalaj fenomenoj rimarkitaj de la multaj amatoraj sismologiaj observejoj kaj amasoj kompletigis kaj pruvis tiujn akiritajn de sismologiaj stacioj per aparatoj, kio multe helpis en ĝusta juĝo pri tuj okazonta tertremo.

Post sinteza analizo la supera instanco disdonis sciigon pri ebla okaziĝo de forta tertremo nokte de la 4-a. Vu Ĉunhia kaj ŝiaj kolegoj telefone sciigis tion al ĉiuj brigadoj de la komunumo eĉ sen perdo de unu sekundo. Dank' al tio la vasta komunumanaro forlasis la domojn kaj la brutoj la stalojn antaŭ la okaziĝo de la granda sismo.



Vu Ĉunhia (la meza) kaj aliaj membroj de la amatora sismologia observejo de Huĝuang-poŝtejo analizas grundan kurenton kune kun sismologia laboranto.



La ĝenerala partia filio de Fangia-brigado ellaboris planon pri disvolvo de produkto kaj rekonstruado de nova vilaĝo.

MOBILIZI AMASOJN POR EVITI DAMAĜOJN

Dank' al mobilizo de la amasoj kaj sufiĉa preparo antaŭ la okaziĝo de la granda tertremo la vastaj amasoj de la plagita regiono tuj sin jetis en la batalon kontraŭ la katastrofo post la tertremo. Janguangie-loĝkvartalo de la urbo Jingkoŭ kaj Jingkoŭ-gubernio estas bonaj ekzemploj pri tio.

Janguangie estas dense loĝata kvartalo, kiu havas pli ol 800 familiojn kun pli ol 3,400 homoj. Dum okaziĝo de tiu tertremo neniu mortis aŭ vundiĝis. Kaj post la tertremo la vivo de la urbanoj estis bone aranĝita.

Su Gijun, sekretario de la partia filio de la loĝkvartalo Janguangie diris al mi, ke ricevinte antaŭinformon pri probabla okaziĝo de granda tertremo en la lasta duonjaro de 1974, la urba partia komitato de Jingkoŭ multfoje okazigis kunvenojn de diversnivelaĵ kadroj por

diskuti pri kontraŭrimedoj. Ili propagandis al la amasoj sciojn pri tertremo kaj kontraŭrimedoj per filmoj, lumbildoj, kursoj kaj bildoj.

La politika vesperlernejo kaj studrondoj de loĝantoj de Janguangie ankaŭ donis scion pri tertremo, tiel ke ĉiu familio konis tiun laboron. Antaŭ la granda tertremo ili kontrolis ĉiujn domojn kaj metis signojn sur la facile faligeblaj domoj, kaj transloĝigis iliajn loĝantojn en apudajn domojn.

Krome ili elektis sekurajn lokojn ĉirkaŭ kiuj ne troviĝis danĝeraj konstruaĵoj kaj ankaŭ la plej sekurajn vojojn laŭ kiuj oni povis atingi la lokon. Ili ankaŭ faris enketon al 57 familioj, kiuj havis maljunulojn de pli ol 80 jaroj kaj aparte organizis homojn por zorgi tiujn maljunulojn, al kiuj mankis familianoj aŭ helpantoj. Ili faris bonan aranĝon ankaŭ por 6 akuŝintinoj kaj 21 loĝantoj grave malsanaj.

En kelkaj tagoj antaŭ la tertremo Su Gijun kune kun la loĝkvartalaj kadroj kaj milicianoj patrolis tage kaj nokte. Post la alarmo pri tuja okaziĝo de tertremo li diris al la loĝantoj, ke ili dormu en la vestoj kaj metu siajn vati-tajn surtutojn kaj ĉapojn en loko facile atingebla por kiel eble plej rapide forlasi la domon.

En ordinaraj tempoj la vivo de la pli-ol-70-jara Vang Bingfang kaj lia edzino estis zorgataj de kadroj de la kvartalo. Dum okaziĝo de la tertremo milicianino Li Venhiu kaj ŝia edzo dorsportis ilin al sekura loko malgraŭ la danĝero. Kun larmoj en la okuloj la maljuna paro diris al mi: "Ni multe dankas ilin, la bonajn kadrojn de la Partio, alie ni mortus pro domfalo!"

Ricevinte alarman sciigon la gubernia partia komitato de Jingkoŭ tuj decideme alprenis rimedojn: Ĉiuj vendejoj kaj artaj amuzejoj ĉesu labori, ĉiuj gastoj forlasu la hotelojn, neniu kunveno plu okazu, ĉiuj malsanuloj en

hospitaloj transloĝigu en sekurajn lokojn kaj ĉiuj urbanoj foriru de la domoj tiel ke la tuta gubernio sin trovis en preteco antaŭ la okaziĝo de la tertremo.

Ricevinte la sciigon pri tuja okaziĝo de tertremo Ŝipengju-brigado de Jingkoŭ-gubernio tuj alarmis al la komunumanoj kaj kolektis ilin sur placo por rigardi filmojn. Kiam oni ĝoje ĝuis la prezentadon okazis la granda tertremo.

Trafite de la tertremo de 7.3 gradoj tamen tre malmulte da homoj kaj brutoj mortis aŭ vundiĝis. Tio plene montris la altan respondecon de la Partio kaj registaro al la popolo kaj ilian organizan kapablecon. Ni povas fiere diri, ke tio estas ebla nur en la socialisma nova Ĉinio. Se la tertremo okazus en la malnova socio, ĝi certe kaŭzus historian tragedion de pereco kaj ruiniĝo de miloj kaj miloj da familioj. Laŭ la registro de historia literaturo, dum la tertremo en Hajjuan de Ninghia en 1920 vundiĝis kaj mortis 200,000 homoj, kaj

La Alumeta Fabriko de Jingkoŭ rapide restarigis sian produktadon.



73,027 mortis sole en Hajjuan-gubernio. La postvivantoj devis barakti en malsato kaj malvarmo, migri aliloken, almozpeti aŭ vendi siajn gefilojn. La nova kaj malnova socioj diferencas inter si ja kiel paradizo kaj infero.

ENERGIA DISVOLVO DE PRODUKTADO

La granda gvidanto de la ĉina popolo Prezidanto Maŭ Zedong tre zorgis la popolon de la plagita regiono. Post la okaziĝo de la forta tertremo en la 4-a de februaro la Centra Komitato de KPC tuj sendis konsolan telegramon al la plagita regiono. Tuj poste la konsola delegacio de la centra komitato gvidata de partiaj kaj ŝtataj gvidantoj veturis tien kaj pasigis tie la Printempan Feston kune kun tieaj laboristoj, malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj.

Trajnoj, aŭtoj kaj helikopteroj plensarĝitaj per bezonaĵoj rapidis de diversaj lokoj al la plagita regiono por helpo kaj medicinaj taĉmentoj de aliaj lokoj venis al ĝi en la sama nokto. Antaŭ la Printempa Festo ĉiuj homoj de la plagita regiono jam enloĝiĝis en simplajn kontraŭfrostajn domojn kaj tendojn.

Kiam la membroj de la delegacio venis al iliaj provizoraj hejmoj, ili kortuŝiĝis ĝis larmoj kaj foje kaj refoje laŭte kriis: “Vivu Prezidanto Maŭ! Vivu la Komunista Partio de Ĉinio!” Por esprimi sian profundan senton iu maljuna malriĉkampano verkis poemon:

*Koro ĉe koro Prezidanto Maŭ ligiĝas
kun ni,
kaj ni profunde amas lin, li same la popolon.
Li sendis al ni bezonaĵojn de mil liojn fore
kaj mil mil familioj sentas varmigitan koron.
Kun am' senlima al la Prezidanto batalas ni
kuraĝe kontraŭ l' katastrofo. Kaj kun plena kvanto
de l' energio ni luktadas por rikolt' abunda,
responde al la kora zorgo de la Prezidanto.*


Sub la zorgado kaj kuraĝigo de la Partio kaj registaro la popolo de la plagita regiono kun multobligita energio sin jetis en batalon por disvolvi la produktadon kaj rekonstrui la hejmlokon. Multaj laboristoj proponis labori ne postulante rekompencojn kaj tagnokte riparis fabriksdomojn. Malpli ol unu horon post la okaziĝo de la tertremo jam ekfunkciis telefonoj, malpli ol 6 horojn post tio la elekotrejo jam rekomencis sian produktadon, kaj malpli ol 24 horojn tubakvo jam estis ekliverita. La fumtubo de la alumeta fabriko rompiĝis, la laboristoj do ĝin anstataŭigis per kunigitaj benzinujoj. Per klopodo de nur dek tagoj la fabriko jam restarigis sian produktadon kaj ĝia monata produktokvanto superis tiun antaŭ la tertremo. En la fino de februaro ankaŭ aliaj nemalmultaj fabrikoj kaj minejoj restarigis produktadon kaj la produktokvantoj superis tiujn antaŭ la tertremo. La totala produktovaloro de industrio de Jingkoŭ en marto pliiĝis je 1.4% kompare kun tiu en la sama periodo de la pasinta jaro. Ankaŭ 12 unuoj de Hajĉeng superplenumis la planon de la unua trimestro.

La komunumanoj de la kamparo elmetis jenan sloganon: “Nepre klopodu kun ankoraŭ pli firma volo neŝanceliĝante antaŭ la malfacilegoj por ke la pomua produktokvanto de greno superu 400 kilogramojn.” Li Ginja, sekretario de la partia filio de Fangia-brigado de Hajĉeng diris al mi: “La tertremo estas malbona afero, tamen ĝi povas transformiĝi en bonan. Ĝi detruis niajn domojn kaj ruiniĝis la malnovan Fangia, sed ni povas projekti kaj konstrui novan socialisman Fangia.”

Nun tiu brigado jam ellaboris planon pri rekonstruo de sia hejmloko kaj desegnoj pri domoj de komunumanoj, oficejo de la brigado, scienca eksperimenta stacio, lernejo, kuracejo, traktora stacio kaj aliaj fabrikoj estas jam faritaj. La konstruado de novaj domoj de la vilaĝanoj jam estis komenca. Scenoj de entuziasma disvolvo de produktado kaj rekonstruado de hejmloko per siaj propraj fortoj estis ĉie videblaj en la plagita regiono.

Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong

tria volumo
(en Esperanto)



Tiu ĉi volumo entenas 31 artikolojn de kamarado Maŭ Zedong skribitajn en la periodo de marto, 1941 ĝis aŭgusto, 1945, kiam nia lando akiris la finan venkon en la Kontraŭjapana Rezistmilito.

Ĝi estas eldonita ankaŭ en la lingvoj angla, araba, birma, franca, germana, hispana, indonezia, itala, japana, korea, persa, portugala, rusa, taja kaj vietnama.

282 p. Bind.

Formato: 15 X 22 cm.

Prezo: £ 0.70 US\$ 2.00

Eldonanto: Fremdlingva Eldonejo, Pekino, Ĉinio

Distribuanto: GUOZI SHUDIAN (Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj),

Mendu ĉe niaj agentejoj en diversaj landoj aŭ rekte ĉe
GUOZI SHUDIAN, P.O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio

Por la nobla idealo

— Noto pri veterana laboristo Li Guocaj

EN la tagoj kiam la ĉina popolo ĝoje celebris la venkan okazigon de la Kvara Tutlanda Popola Kongreso, la Ministerio de Petrola kaj Kemia Industrioj ricevis petskribon kun jena enhavo: “La Kvara Tutlanda Popola Kongreso faris batalan alvokon konstrui nian landon en modernan socialisman potencon en la kuranta jarcento. Ni laboristaro estas mastro de la lando kaj devas respondi al la alvoko per ago kun heroismo kaj entuziasmo de landa mastro. Ni petas ke la gvidantaro asigu al ni la taskon produkti genutubojn el rustimuna ŝtalo bezonatajn de petrola kaj kemia industrioj, kaj tion ni plenumos entute!”

La petskribo plena de revolucia patoso estis skribita de komunisto Li Guocaj, estro de la tuboprilabora grupo de la Gilin-a Kemiindustria Kompanio. En la pasinta jaro, por kontentigi la bezonon de la rapide disvolviĝanta kemisterka industrio de nia lando, li kaj liaj grupanoj sukcesis fari genutubojn el rustimuna ŝtalo per premmaŝino, kaj dank’ al tio altigis la produktivecon je pli-ol-mil-oblo.

SEN GRANDA VOLO ONI POVAS SUKCESI EN NENIO

En 1960 Li Guocaj estis nomumita estro de la tuboprilabora grupo. La ĉefa tasko de la grupo estas produkti diverskalibrajn genutubojn el metalaj tuboj bezonatajn de kemiaj fabrikoj. Unu meza kemia fabriko bezonas ĉ. dek mil diversnormajn genutubojn. En la pasinteco oni produktis genutubojn sen maŝino, kio postulis grandan laborintensecon. Tiam malgranda estis la kvanto de la produktaj kaj ne ĉiam bona estis ilia kvalito.

Nia kemia industrio en rapida disvolviĝo bezonas pli kaj pli multajn genutubojn, kies plejparto devis esti importita. Tiam iu afero forte emociis lin.

En ferio de la Printempa Festo, 1966, kiam Li Guocaj venis al sia laborgrupo, li trovis ĉiujn deĵorantajn laboristojn indignantaj kaj demandis: “Kio okazis?” La lastaj respondis laŭte: “La fremdlanda specialisto, kiu respondecas pri muntado de tiu importita kompleto da kemiindustriaj ekipaĵoj, diris, ke la konstruado devos esti ĉesigita, se la bezonataj genutuboj por maŝinpartoj estos ne liveritaj en la venonta monato.” “Li diris ankaŭ, ke ni certe ne povos liveri tian genutubon en mallonga tempo, escepte se ni aĉetos tion de ili.” Tion aŭdinte Li Guocaj diris emocie: “Ni devas nin apogi ne sur importado, sed sur niaj propraj fortoj kaj strebi al potenciĝo. Sen granda volo oni ne povas fari revolucion!” Li kaj la aliaj kune studis la instruon de Prezidanto Maŭ ke **“La ĉina popolo havas fortan volon kaj grandan kapablon, kaj nepre atingos kaj superos la avangardan mondan nivelon en nemalproksima estonteco”**, kaj ili decidis preni Daking-ajn laboristojn kiel lernindajn ekzemplojn kaj nepre fabriki tian genutubon kun granda volo kaj per siaj propraj fortoj.

La genutubo kun alta precizeco devas esti fabrikita per potenca premmaŝino. Kion fari sen tia ekipaĵo? Li Guocaj interkonsiliĝis kun la grupanoj. Li diris: “La laboristoj de la Ŝanhaja Giangnan-ŝipfarejo kun granda volo fabrikis 10,000-tunan hidraŭlikan premilon. Ĉu ni ne povas fari malpli grandan?” Post konsiliĝo ili elmetis proponon fabriki hidraŭlikan premilon kun 600 baroj. Iu admonis dirante: “Laŭ la teknika normo ekster-

landa por fabriki tian hidraŭlikan premilon oni bezonas alojan ŝtalon, sed vi havas nur malnovan ekipaĵon. Se la oleujo surhavas fendeton aŭ trueton, oleo elŝprucos kiel sago kaj tuŝegos nin neŝerce! Forlasu la ideon do!" Li Guocaj kaj aliaj respondis firme: "En revoluciado, oni devas esti pretaj sangi kaj ŝviti. Timante lupon fronte kaj tigron malantaŭe, ĉu oni povas konstrui socialismon?"

Ĝuste en tiu tempo, komenciĝis la Granda Proleta Kultura Revolucio, la grupanoj sub la gvido de Li Guocaj kritikis la kompradoran filozofion, rampismon kaj aliajn erarajn pensojn kaj firmigis siajn decidon kaj memfidon en konstruado per siaj propraj fortoj. Subtenate de la partia komitato de la kompanio, ili komencis provan fabrikadon de hidraŭlika premilo.

Post kelktempa klopodo, venis la tago en kiu oni faros altpreman provon al la hidraŭlika premilo. La laboristoj konkure sin anoncis por preni tiun gloran kaj danĝeran taskon. Sed, kiel Li Guocaj povis lasi aliajn plenumi tiun taskon? Li emocie diris: "Lasu tion al mi! Hodiaŭ mi estas la komandanto!"

Li Guocaj rapide ŝaltis la motoron kaj ekbruis la altprema olepumpilo de la hidraŭlika premilo. La nadlo de la barometro supren saltetadis, pli kaj pli maltrankviliĝis la laboristoj. Li Guocaj aplombe faris ordonojn de tempo al tempo: "Levu plu la premon, levu plu!" Je 640 baroj la nadlo haltis. Kompleta kontrolado montris ke la maŝino funkcias normale.

Sub la gvido de Li Guocaj la grupanoj fine fabrikis tian genutubon per memfarita ekipaĵo.

Kiam la unua nombro da genutuboj transportiĝis al la konstruejo, la fremdlanda specialisto eĉ ne kredis siajn okulojn. Li mezuris ilin foje kaj refoje sed trovis nenion kritikinda. Li kunigis la aperturojn de kvar genutuboj, levis ilin kontraŭ la sunlumo kaj trovis ke neniom da lumo tralasiĝis tra la kuniĝejoj. La normo de tiaj tuboj ne toleras eraron de plus aŭ minus tri gradoj, tamen la eraro de tiuj tuboj eĉ ne atingis duongradon. "Miraklo! Miraklo!" diris la specialisto.

Dank' al sia malfacila klopodado dum dek jaroj, la prilabora grupo sub la gvido de Li Guocaj ĝisfunde ŝanĝis la postĝintecon de nia



Li Guocaj (la unua de dekstre) kune kun aliaj laboristoj en studo de teorio


lando en produkto de genutuboj. Per la diversaj genutuboj de ili produktitaj ili ne nur kontentigis la bezonon de kemiindustrio kaj fundamenta konstruado de Gilin-provinco, sed ankaŭ helpas pli ol dek provincojn kaj urbojn kaj kelkajn fratajn landojn.

LABORI PLENENERGIE POR KONSTRUI SOCIALISMON

Li Guocaj ofte diras, ke nun ni faras kion neniam faris la antaŭuloj. Sukcesi en tio sen penado estas nur fantazio! Por konstrui socialismon oni devas labori kun plena energio sed ne sen peno. Dum sia laborado pli-oldek-jara en la prilabora grupo, nenia malfacilo povis bari lian antaŭenmarŝon.

En la jaro 1960, ankaŭ la konstruado de acidrezistaj turoj, en kies konstruado partoprenis Li Guocaj, estis ĉesigita pro la ĉesigo de la liverado derustimuna ŝtalo fare de la sovetiaj reviziistoj. Antaŭ tiu malfacilo Li Guocaj montris heroecon de la ĉina laboristaro, li diris al siaj kamaradoj: "Tio ne gravas, sen ili ni ankaŭ povas konstrui socialismon!" Li kaj aliaj kamaradoj cerbumadis kaj elpensis, laŭ sia praktika sperto, la solvon fari internan muron de tia turo el kaheloj anstataŭ rustimuna ŝtalo. Tamen, por tion fari oni devas tranĉi grandan kvanton da kaheloj. Je la komenco, la tranĉado malsukcesis pli ol 90-pocente kaj blankaj kahelpecoj kovris grandan terpecon. Iuj deprimiĝis antaŭ la malfacilo. Li Guocaj stimulis la kamaradojn dirante: "Ne perdu kuraĝon, por ĉiu problemo ekzistas solvo." Post ripetada esplorado kaj provado ili fine fabrikis tranĉmaŝinon de kaheloj, kiu unufoje povas tranĉi kelkdek kahelojn bonkvalite kaj senfuŝe. Poste, ili ankoraŭ venkis multajn aliajn malfacilojn, kaj baldaŭ venke konstruis la acidrezistajn turojn.

Iuvespere de oktobro, 1968, Li Guocaj, kiu tiam estis en alia loko, neatendite ricevis urĝan telegramon, en kiu oni petis lin tuj reveni al la urbo Gilin por partopreni en urĝa kaj danĝera laboro de iu konstruado. Por atingi la urbon oni devis veturi pli ol 200 km. sur




Produkti genutubojn per premmaŝino fabrikita de ili mem

zigzaga montregiona ŝoseo kaj facile povis okazi akcidento al noktaj veturantoj, tial kamaradoj admonis ke li veturu en la sekvanta mateno. Li Guocaj diris: "La urĝa tasko bezonas ĉiun sekundon."

Rapide galopis la jipo en la ondanta Ĉangbaj-montaro, kaj post pli ol tri horoj li jam atingis la lokon. Deĵipiĝinte, li tuj sin jetis en la laboron. Dank' al la klopodado de Li Guocaj kaj la aliaj, tiu urĝa tasko, kiun oni devis plenumi en tri-kvar monatoj laŭ la plano, plenumiĝis en nur duonmonato.

ĈIAM ANTAŬEN NIA PROLETA LANDO

Li Guocaj strikte kunligis sin kun la konstruo de socialismo kaj efektivigo de komu-



Li Guocaj (la tria de dekstre) kaj aliaj laboristoj levas kaldronegon per hidraŭlika levmaŝino fabrikita de ili mem.

nismo. Dum la pasintaj dekelkaj jaroj li ĉiam sinofere klopodis por efektiviĝi tiun noblan idealon.

Li Guocaj naskiĝis en familio de malriĉkamparano en Ĉangli-gubernio, Hebej-provinco. La damninda malnova socio forprenis la vivon de liaj tri familianoj. En sia 14-jara aĝo, li laboris kiel infanlaboristo kaj baraktis en abismo de mizero. Post la Liberiĝo, Li Guocaj fariĝis, kiel aliaj laboruloj, mastro de la ŝtato. En la jaro 1954, li venis al la urbo Gilin por partopreni en konstruado de la unua kemiindustria bazo de nia lando. Dum la laborado li sentis sin plena de forto neelĉerpebla. En dimanĉoj aŭ feriaj tagoj, kolegoj invitis lin promeni en urbo, sed li iris al la konstruejo kaj laboris tie tutan tagon. Trovinte ke liaj vestoj ĉiam estas malsekigitaj de ŝvito, gvidantoj kaj veteranaj laboristoj demandis lin zorgeme: “Ho, malgranda Li, de kie vi akiris tian energion?” Li Guocaj diris ridetante: “En la malnova socio bienuloj kaj kapitalistoj rigardis nin kiel bovojn kaj ĉevalojn, dum en la nova socio ni fariĝis mastroj de la ŝtato. Ni devas esti veraj mastroj en laborado.”

Frue en la jaro 1960, la prilabora grupo gvidata de Li Guocaj jam iniciate likvidis laŭpecan salajron. Tiam kelkaj personoj tion ne komprenis. Tamen Li Guocaj diris: “La aktiveco ekscitita per mono ja estas ne socialisma. En revolucio ni devas apogi nin sur nia politika konscio de proletaro.” Dank’ al ilia energia klopodado, ili plurobligis la difinitan produktokvanton. Kaj en la lastaj jaroj, ilia unujara tasko de prilaborado de genutuboj estis finplenumita ĉiam en duonjaro, kaj en la cetera tempo ili okupiĝis pri aliaj laboroj.

Antaŭ la kultura revolucio, Li Guocaj sukcesis en multaj gravaj teknikaj renovigoj. La koncernaj institucioj multfoje volis doni al li premion laŭ ŝtata regularo, sed li rifuzis. En la jaro 1963, laŭ liaj kontribuoj kaj kapablo, la gvidantoj decidis promocii lin je du rangoj. Li dankis la Partion pro la zorgo sed neniel volis akcepti la promocion, dirante: “Jam sufiĉe bona estas mia nuna vivo.” Pro tio li estis varme laŭdata de la gvidantoj, laboristoj kaj oficistoj de la kompanio. Iu demandis Li Guocaj: “Vi ne volis premion nek promocion,

kion do fine vi volas?” Li respondis: “Burĝoj volas monon, dum ni laboristoj volas ke ĉiam antaŭen marŝu nia proleta lando!”

En la Granda Proleta Kultura Revolucio Li Guocaj estis hardita kaj provita en la batalo inter la du klasoj kaj la du linioj. Senĉese altiĝis lia konscio pri tiu batalo kaj pri la daŭrigo de la revolucio sub la diktaturo de la proletaro, kaj plifirmiĝis lia volo tutkore servi al la revolucio. Post kiam li estas elektita kiel vicestro de la Urba Revolucia Komitato de Gilin, lia tasko fariĝis pli peza, tamen li neniam perdis sian naturon de laborulo. Kien li iris, tie li eklaboris kune kun amasoj. En ordinaraj tagoj, li malofte sidis en la oficejo de la urba revolucia komitato. Oni demandis lin, kie li laboras. Li respondis: “Mi laboras inter amasoj aŭ en fabrikaj laborejoj.” Kamaradoj ŝerce diris: “Vere granda estas la kabineto de Guocaj!” Antaŭ la Liberiĝo, Li Guocaj vizitis lernejon nur tri jarojn. Pro sia malalta klereco li renkontis malfacilojn en studo de teorio. Li diris: “La verkoj de Marks, Engels, Lenin kaj Stalin kaj la verkoj de Pre-

zidanto Maŭ estas skribitaj por ni laboristoj. Kiom ajn grandaj estas la malfaciloj, ni devas bone ilin studi.” En la pasintaj pli ol dek jaroj, li persistis en studado de la revolucia teorio.

La Partio kaj la popolo multe honoris lin pro liaj kontribuoj al la revolucio. En 1964, li glorie ricevis la titolon de labormodelo de speciala rango. En 1973, li glorie ĉeestis la Dekan Tutlandan Kongreson de KPĈ. Li ĉiam kaj ĉie prenas la ferulon Vang Ginhi, eminentan reprezentanton de la ĉina laboristaro, kiel ekzemplon, tial en la kuranta jaro la partia komitato de la Gilin-a Kemiindustria Kompanio titolis lin “laboristo de ferulo-tipo”. En la pasintaj pli ol dek jaroj, Li Guocaj estis dekdufoje akceptita de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ. Multe honorita, li firme memoras la instruon de Prezidanto Maŭ esti modestema kaj singardema, esti nek fiera nek malpacienca. Nun li diligente studas marksisman teorion pri la diktaturo de la proletaro, decidis daŭre konservi kaj disvolvi la komunistan revolucionan spiriton kaj batali ĝisfine por firmigi la diktaturon de la proletaro.



FERKLINGA BATALILO ANTAŭ 3,000 JAROJ

Arkeologiaj laborantoj de Hebej-provinco trovis bronзан batalilon kun fera klingo en la restejo de Ŝang-dinastio (la 16-a jarcento a.k. — la 11-a jarcento a.k.) de la gubernio Gaŭĉeng.

Tiu antikva batalilo longas je 11.1 centimetroj kaj larĝas je 8 centimetroj de la supra ĝis la malsupra pinto. Pro rustiĝo en multaj jarcentoj sub la tero la bronza parto de la batalilo jam estas detruita kaj ĝia fera klingo plejparte perdiĝis kaj restas nur parto kun larĝeco de unu cen-

timetro envolvita en bronzo. Post unua-paŝa ekspertizo de koncernaj institucioj oni opiniis ke la fera parto de la batalilo estas forĝfero akirita de antikvuloj per forĝado (ankaŭ iuj opiniis ke ĝi estas meteor-fero). La batalilo estis farita laŭ jenaj procedoj: unue la klinga parto estis prilaborita per fajro kaj martelo kaj poste la formita klingo estis enmetita en la bronzan parton.

Rilate al la tempo de eltrovo kaj ekuzo de fero en nia lando, oni ne trovis en la antikva literaturo kaj sur la historiaj restaĵoj nedubeblan ateston, ke antaŭ Ĝou-dinastio (la 11-a jarcento a.k. — 771 a.k.) oni jam uzis feran objekton. La malkovro de tiu bronza batalilo kun fera klingo estas grava materialo por studi kaj difini la tempon de ekuzo de fero en nia lando kaj koni la disvolviĝon de produktado en la antikva Ĉinio.

Gazetoj el Ĉinio

PEKINA REVUO — Semajna gazeto politika kaj teoria. Ĝi aperas en la angla, franca, germana, hispana kaj japana lingvoj kaj estas distribuata aerpoŝte tra la mondo.

ĈINIO — Grandformata monata gazeto kun belaj bildoj kaj lakonaj tekstoj. Ĝi aperas en la ĉina, angla, araba, franca, germana, hindia, hispana, indonezia, itala, japana, korea, rusa, sŭahilia, sveda, urdua kaj vjetnama lingvoj.

ĈINIO EN KONSTRUADO — Monata gazeto riĉe ilustrita kun ĝenerala enhavo. Ĝi aperas en la angla, araba, franca, hispana kaj rusa lingvoj.

ĈINA LITERATURO — Literatura kaj arta gazeto eldonata monate en la angla lingvo kaj trimestre en la franca.

POPOLA ĈINIO — Monata gazeto kun ĝenerala enhavo eldonata en la japana lingvo.

EL POPOLA ĈINIO — Monata gazeto kun ĝenerala enhavo eldonata en Esperanto.

Bonvolu aboni

**Distribuas: GUOZI SHUDIAN (Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj),
Pekino, Ĉinio**

**Abonu ĉe niaj agentejoj en diversaj landoj aŭ rekte ĉe
GUOZI SHUDIAN, P.O. Kesto 399, Pekino, Ĉinio**

4,000-ĉevalpova dizela lokomotivo

La Dalian-a Lokomotiva kaj Vagona Fabriko havas historion de pli ol 70 jaroj. Antaŭ la Liberiĝo ĝi nur povis ripari vaporajn lokomotivojn kaj vagonojn. Post la Liberiĝo, sub la direktado de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ kaj sin apogante sur siaj propraj fortoj, ĝi fariĝis post plurfojaj reformoj fabriko kiu povas pogrande produkti dizelajn lokomotivojn kaj vagonojn.


Depost la komenco de la Granda Proleta Kultura revolucio, la partia komitato de la fabriko persistis en la fundamenta linio de la Partio kaj profunde disvolvis amasan movadon de "lerni de Daking en industrio", kaj per tio levis altan tajdon de produktado. En la jaro 1970, ĝia produkta sistemo de vagonoj estis reformita, tiel ke ĝia produktiveco triobliĝis; en 1971 la produkta sistemo de varma prilaborado estis reformita, tiel ke la produktiveco altiĝis je 50 procentoj; de la jaro 1972, la produkta sistemo de lokomotivo estis reformita por produkti la dizelan lokomotivon "Dongfeng-4". Ĝi konstruis unu post alia 53 diversajn produktajn liniojn kaj efektiviĝis pli ol 9,400 teknikajn renovigojn.

La ŝanĝiĝo de la produktaj kondiĉoj forte akcelis la disvolviĝon de la produktado, kio tute novigis la fizionomion de la malnova fabriko.


Nun, la 4,000-ĉevalpova dizela lokomotivo "Dongfeng-4" estis jam oficiale produktata, kaj per tio la fabriko faris novan kontribuon por disvolvi nian fervojan transportadon.

4,000-ĉevalpovaj dizelaj lokomotivoj estas pretaj elfabrikiĝi.





Fang Baūgang, teknikisto
deveninta de laboristo




Metilernantino Vang Sāuvan






Veterana laboristo kaj la-
bormodelo Liu Guojong



Avangarda laboristo Giang Fenglian.



Gvidantoj de la fabriko solvas proble-
mojn en produktado kune kun laboristoj.





Aŭtomata laborlinio por produkti kuplostangojn starigita en la unua maŝina laborejo




Nova granda bormaŝino en muntado


Ekzameno pri la rektifa silicia elemento de 500 amperoj montras bonan efikon.






Projektado de nova mašino





Ekzameno de potenco dizelo




Laborantoj de la varmtrakta laborejo sukcesis starigi novan plakan teknologion.

Laborejo por ĝenerala muntado de dizela lokomotivo



Komforta stirejo



4.000-čevalpova dizela lokomotivo en transportado



de GIANG VEN

SUR malnova fluejo de la Flava Rivero en la norda parto de nia Giangsu-provinco troviĝas la Semoprodukta Kultivejo de Sijang-gubernio. Kvankam ĝi havas nur pli ol 130 hektarojn da agro, tamen ĝi produktas ĉiujare pli ol 500 tunojn da bonspeciaj semoj, kiuj jam estas enkondukitaj kaj kulturataj de 12 provincoj de nia lando. Kaj krome ĝi ankaŭ elkulturis plurajn novajn bonajn speciojn. Kiam ni vizitis la kultivejon, oni entuziasme rakontis al ni, kiel ĝi servas por disvolvi la socialisman agrikulturon.

INSPIRO DE DU MALSAMAJ REZULTOJ

Oni rakontis al ni jenan okazaĵon: Antaŭ kelkaj jaroj, la laboristoj kaj oficistoj de la kultivejo elkultivis kelkajn altproduktajn speciojn de tritiko, kies pohektara produktokvanto atingis 6.5 tunojn, iuokaze eĉ pli ol 7 tunojn en eksperimentado sur malgranda areo de la kultivejo. Sed, kiam oni prove kulturis tiujn sur grandaj areoj de popolaj komunumoj en kamparo, ili nur donis malaltan produkton pro tieaj malpli bonaj kondiĉoj en akvo kaj sterko ol tiuj en la kultivejo. Tial ili ne estis bonvenaj ĉe komunumanoj. Dum la du specioj de rizo, nome "Sidaŭ 1" kaj "Sidaŭ 4", kiuj maturiĝas pli frue ol ordinara specioj je 15 tagoj kaj ebligis du rikoltojn de tritiko kaj rizo en unu jaro, estis varme akceptataj en

norda parto de Giangsu-provinco, kie la senprujna periodo estas mallonga, kaj rapide kulturataj sur pli ol 40,000 hektaroj.

El la du malsamaj rezultoj tre instrudonaj la laboristoj kaj oficistoj de la kultivejo ekonis, ke por bone servi al la agrikultura produkto, oni devas elkulturi kaj vastigi bonajn speciojn laŭ lokaj bezonoj kaj kondiĉoj. Socialisma semoprodukta kultivejo devas kontribui al rapida disvolvado de socialisma agrikulturo, laŭ la malsamaj kondiĉoj de miloj kaj miloj da agrikulturaj produktaj brigadoj.

Kun altiĝo de konado, la aktiveco de la laboristoj kaj oficistoj de la kultivejo leviĝis ankoraŭ pli alte. Dum disvastigado de la bonspecia rizo "Sidaŭ 4", la loka teknikisto Ĉen Ĉangming trovis ke spikoj de la specio estas ne sufiĉe grandaj, nek ĝi estas sufiĉe rezistema kontraŭ malsanoj. Li do decidis preni sur sin la taskon solvi tiujn problemojn kaj serioze ekfaris provojn kaj esploron. Ekde la jaro 1970, sub la helpado de laborantoj de la kultivejo Ĉen Ĉangming ĉiujare zorge kolektis milojn da grandaj spikoj de individuaj plantoj, kiuj montris sin rezistemaj kontraŭ malsanoj el kelkdek hektaroj da rizkampoj de la specio "Sidaŭ 4". Tra ripetada selektado kaj arta hibridigo ili elkulturis kelkajn bonajn speciojn de rizo, kiuj havas kompare stabilan genotipan econ. Por ekzameni

rezistemon de la novaj specioj en diversaj medioj kaj ne perdi tempon ankaŭ dum vintro, li venis en du sinsekvaj vintroj al Hajnan-insulo por tie provkulturi ilin. Fine li elkultivis bonan specion "Sidaŭ 5", kiu donas rikolton pli altan ol "Sidaŭ 4" sub ordinara kondiĉoj de akvo kaj sterko. En 1974, oni disvastigis kaj plantis ĝin en miloj da hektaroj, kun rezulto de pliprodukto de ĉ. 20%.

Mezuri longecon de kotonfibro



Artefarita fekundigo



POR PLI MULTE KONTRIBUI

La kultivejo havis nur unu teknikiston, kiu ricevis specialan edukon pri semselektado. Tamen ekde la Granda Proleta Kultura Revolucio la kultivejo elkulturis 21 novajn speciojn de kotono, rizo, tritiko, sojfabo k.a., inter kiuj 7 specioj estas disvastigitaj kaj kulturataj en grandaj areoj. Dum praktiko, oni ankaŭ kulturis aron da teknikistoj. Kial la malgranda kultivejo starigita de la gubernio povas fari tiel grandan kontribuon? La laboristoj kaj oficistoj diris prave: "Stariĝinte en si la penson tutkore kaj tutanime servi al disvolvo de socialisma agrikulturo, oni nature strebas al farado de kiel eble plej multa kontribuo."

La sukceso de elkulturo de bona specio de kotono "Simian 1" estas konkreta manifestiĝo de tiu revolucia spirito.

La tasko de la semprodukta kultivejo propre konsistas nur el produktado de kotona semo mem. Sed, kiam ili sukcese plenumis sian taskon, ili decidis plie ankaŭ elkulturi novajn bonajn speciojn por la patrolando. Foje, Ĝeng Fafu, teknikisto de scienca eksperimenta grupo, elektis unu individuan kotonplanton kun multaj kaj grandaj kotonfruktoj intencante ĝin kulturi por ricevi bonan specion. Informiĝinte pri tio, iu diris al li: "Konsideru bone la fakton, Maljuna Ĝeng, ke ni ankoraŭ ne estas sufiĉe spertaj por elkulturi novan specion." Aliaj admonis lin: "Ne trudiĝu en dornejon! Alie, vi ricevos nur dornojn por via ŝvitado!" Li respondis: "Se ni ne havas fakajn sciojn, tion ni lernu. Por kontribui al revolucio ni ne devas timi malfacilojn." Ankaŭ la gvidantaro de la kultivejo varme kuraĝigis lin: "Ricevi novajn pli bonajn koton-speciojn estas deziro de malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj, kaj ankaŭ bezono de la ŝtato. Se nur la direkto estas ĝusta, vi kuraĝe faru vian provadon. La eventualajn malfacilojn ni kune venku!" La teknikisto Ju Gingĝong meminciate rakontis al li sian sperton pri direktado de scienca eksperimento per materiisma dialektiko.

La subteno de la gvidantoj kaj helpado de la amaso plifirmigis lian decidon kulturi bon-speciojn por la revolucio. Kiam la koton-semoj de li elektitaj ĝermis, li tagnokte flegis ilin ĉe la bedo. Kiam kreskadis la koton-plantoj, li kaj kamaradoj de la scienca grupo daŭre observadis ilin sen interrompo eĉ dum ŝtormo kaj detale notis ĉion observitan. En sezono de kotonrikolto, ili unu post alia kolektis la kotonfruktojn, aparte pesis ilian lanugon, mezuris la longecon de la fibro kaj kalkulis la produktokvanton, por elekti la plej bonajn semojn surbaze de notitaj konstataĵoj en nombro de pli ol cent miloj. En la sekvinta jaro ili ripetis la samon kaj tiamaniere daŭrigis la selektadon jaro post jaro, oferante sian diligentan penadon. Vidante, ke Ĝeng Fafu malgrasiĝis pro la laciga laborado, lia patrino maltrankvile diris al li: “Kotono de la kultivejo amasiĝas ĉiujare kiel arĝenta monto, kial vi ankoraŭ tiel turmentas vin per tagnokta laborego sur la kampoj?” Li respondis kun rideto: “Monto da kotono en nia kultivejo ne estas troabundo. Mi ne ŝparos mian forton, ne domaĝos fari pli laciĝan laboron, se tio helpas havigi montojn da kotono al ĉiuj komunumoj kaj produktaj brigadoj.”

Post kvinjara klopodado, ili fine elkulturis la novan kotonan specion “Simian 1”, kiu havas pli fortan kreskpovon en frua periodo kompare kun la malnova specio, ne nur povas frue kaj sane ĝermi, sed ankaŭ havas kompaktan branĉaron kaj fortan kreskpovon ankaŭ en posta periodo, kaj kies maturiĝo estas iom pli frua kaj produktokvanto je pli ol 10% pli granda kompare kun tiu de la malnova specio. Nun, ĝi jam estas kulturata sur areo de pli ol 40,000 hektaroj kaj estas tre bonvena ĉe la amasoj de kotonregionoj.

BONA SPECIO DISVASTIĜAS ĈIEN

Bonaj specioj elkulturitaj de la kultivejo estas varme akceptitaj de vastaj amasoj de kamparaj komunumoj. En la jaro 1974, Duĉang-gubernio de Gianghi-provinco prove kulturis 60 hektarojn da kotono de “Simian 1” en iu



Riĉa rikolto de kotono

brigado. La produktokvanto altiĝis per 15%-20% kompare kun tiu de la malnova specio tie kulturita, tiel ke la kadroj de la gubernio decidis ĝeneraligi ĝian kulturadon tra la tuta gubernio en du aŭ tri jaroj.

Tio tamen ne estas sola kazo. La kultivejo ĉiujare produktas kelkcent tunojn da semoj de bonaj specioj por provizi, krom Giangsu, ankaŭ Anhuj, Ŝandong, Henan, Hingiang, Gianghi, Hunan kaj aliajn, entute 12 provincojn, urbojn kaj aŭtonomajn regionojn kun rezulto de pliprodukto.

Kun disvastigado de bonaj specioj en pli grandaj areoj, la bezono de la semoj pli kaj pli kreskas. Por kontentigi tiujn bezonojn, la kultivejo ĉiamaniere fosas latentajn fortojn, vastigas semkulturan areon en apudaj produktaj brigadoj kaj racie maldensigas la semadon por ŝpari la semojn. En printempo de iu jaro, iu komunumo en Anhuj-provinco urĝe bezonis kotonsemojn por plenigi la mankon de plantoj kaŭzitan de malsufiĉa

ĝermado de donitaj semoj kaj petis per telegramo de la kultivejo helpon. Kutime rigardante malfacilojn de aliaj kiel siajn, la laboristoj kaj oficistoj de la kultivejo tuj sendis unu tunon da kotonsemoj el sia rezervo por garantiĝi aldonan semadon de la komunumo.

Krom tio, la kultivejo ankaŭ per akceptado de vizitantoj, elsendo de personoj por doni helpon al aliaj lokoj kaj interŝanĝo de teknikaj materialoj, starigis interrilatojn kun pli ol 1,000 frataj unuoj, kaj konigis al ili spertojn de pliprodukto de greno kaj koton. Ekde la Granda Proleta Kultura Revolucio sole por disvastigi kotonkulturan teknikon la kultivejo sendis pli ol 200 homfojojn al pli ol 30 unuoj en ses provincoj, iuj el kiuj eĉ faris preleĝojn en agrikultura kolegio.

En printempo de la jaro 1974, veterana laboristo Ĝang Liĉeng estis invitita al iu komunumo de Henan-provinco por instrui la teknikon de kulturo de kotonplantidoj en

kulturaj vazoj por poste transplanti en kampojn. Tiu metodo akcelas fruan maturiĝon kaj altan produkton de koton kaj estas sukcese uzata de multaj komunumoj kaj brigadoj. Sed la menciita komunumo multfoje malsukcesis en provado. Alveninte tien Ĝang Liĉeng informiĝis pri antaŭaj malsukcesoj kaj trovis iliajn kaŭzojn. Tiam li mem preparis la vazojn kaj demonstris ankaŭ la transplantadon de ĝermintaj plantidoj el la vazoj al la kampoj. Laŭ lia ekzemplo la komunumo refoje aplikis la metodon kaj akiris en aŭtuno pliprodukton de pli ol 20% kompare kun tiu de senpera semado aplikita antaŭe. La komunumanoj ĝoje diris: "En nia riĉa kotonrikolto ĉijare kontribuis grave nia maljuna Ĝang!"

La laboristoj kaj oficistoj de la kultivejo, kiuj tutkore kaj tutanime servas al agrikultura produkto, ne sole provizante per bonspeciaj semoj sed ankaŭ disvastigante avangardan teknikon, rikoltis varmajn laŭdojn de komunumoj kaj produktaj brigadoj de diversaj lokoj:

*Sur malnova lito de l'
Flava Rivero
diligentas semprodukta
kultivejo.*

*Tenas ĝi en kor' la tuton
de l' revolucio,*

*Floras ĝiaj bonspecioj
ĝis dekmil' da lioj.*



Sendi bonspaciajn semojn aliloken

Serĉado de parencoj

Tio okazis en la monturbo Vuĝoŭ de la Guanghi-a Ĝuang-a Aŭtonoma Regiono de nia lando.

Matene juna policano Hju Guangjuan surpaŝis Vuĝoŭ-ponton akompanante paron da preskaŭ sesdek-jaraj geedzoj. Montrante la riveron sub la ponto li diris: “Jen estas Fuhe-rivero!”

“Ho, Fuhe-rivero!” rigardante la klaran riveron la maljunulo ankoraŭ fortika ege emociiĝis. Li estas elmigrinta ĉino nomata Ĝang Song, kiu revenis el fremda lando por vidi siajn parencojn. Ĉimomente kiam li rigardis la riveron, la tragedia travivaĵo de lia infanaĝo denove aperis antaŭ liaj okuloj . . .

Pluvetis en iu vintra vespero antaŭ kvindek jaroj. Tiam tre malgrasa Ĝang Song, kiu ĵus atingis sep jarojn, en ĉifonaj vestoj staris ĉe pordo de drinkejo atendante la revenon de la patrino almozpetanta. Subite viro kun nigra silka zono ĉe sia talio iris al li kaj diris kun ŝajnigita rido: “Venu, knabo! Mi konduku vin al feliĉa loko kie abundas bonaj manĝaĵoj kaj vestoj.” Je tio la viro etendis siajn nigrajn manegojn, kaj kiel ajn Ĝang Song baktis, li tamen ne povis sin liberigi, kaj estis vendita kaj portita al la Suda Azio kaj tie fariĝis infan-laboristo. En la fremda lando li eĉ en sonĝo sopiris al la patrolando, al la torenta Fuhe-rivero kaj al siaj parencoj . . .

Hodiaŭ Ĝang Song fine revenis al la hejmloko kiun li forlasis jam kvindek jarojn, kiel

li deziregis tuj vidi siajn parencojn! Li diris tion al koncerna institucio. La juna policano Hju Guangjuan prenis sur sin la taskon helpi Ĝang Song serĉi la parencojn.

Iun tagon Ĝang Song kaj lia edzino en akompano de Hju Guangjuan venis al Venlanĉong kie Ĝang Song loĝis en la infanaĝo.

Survoje Hju Guangjuan parolis al la geedzoj: “Tiu ĉi larĝa vojo antaŭe estis Venlanĉong-kavo kaj la loko kie nun staras etaĝdomoj estis antaŭe fetoraj kanaletoj; kaj tiu komerca kvartalo antaŭe estis dezertejo.” Li provis per tio veki al la maljunulo rememorojn pri la antaŭa loĝejo de lia familio kaj el tio trovi ian spuron por serĉado. Sed Ĝang Song balancis sian kapon dirante: “Ĉio ŝanĝiĝis! En mia infanaĝo mi iris mallarĝan montvojeton, kaj ambaŭflanke de ĝi estis dezerteco. Tamen hodiaŭ mi iras sur larĝa vojo, sur kiu kuradas aŭtoj, jam tute aliĝis la antaŭa Venlanĉong!”

En la lastaj tagoj Hju Guangjuan cerbumis pri ĉiu spuro donita de Ĝang Song. La infana nomo de Ĝang Song estas Hihia kaj lia patro Ĝang Haj estis la tria filo de lia avo. Origine lia familio loĝis en Ĝongcun-vilaĝo proksime de Venlanĉong. Kie do estas nun la vilaĝo? Pri tio Hju Guangjuan ne nur pridemandis ĉie, sed ankaŭ legis registrolibron de loĝantoj en la popola administracio, sed li trovis nenion pri la vilaĝo kaj Ĝang Haj. Malgraŭ tio li decidis nepre helpi Ĝang Song trovi siajn parencojn konsiderante la devon de

popola policano. En Venlanĉong li vizitis multajn maljunulojn kaj fine eksciis ke la antaŭa Ĝongcun-vilaĝo jam alinomiĝas nun Ĉangĝoŭdaŭ. Poste li akiris alian spuron de maljuna malriĉkamparano ke antaŭ la Liberiĝo sin trovis tie laboristo nomata Ĝang Ĵong, kiu laboris en pilofarejo. Oni diris, ke lia nevo perdiĝis antaŭ la Liberiĝo.

Vespere inspire de Hju Guangjuan Ĝang Song ekmemoris ion alian pri la antaŭa loĝejo: Kaduka kabano estis ĉirkaŭata de lotus-baseno. Li faris desegnon pri tio kaj donis al Hju Guangjuan. Kiam Hju foriris de li, jam estis la 23-a horo kaj tridek minutoj en la nokto. Ĉe la pordo de la hotelo Ĝang Song diris emocie: “Vi multe laciĝis de klopodoj por mi. En la malnova socio la kuomintang-aj policanoj ĉiamaniere ĉantaĝis la laborantan popolon, sed en la nova socio policanoj estas pli intimaj ol parencoj!” Hju Guangjuan ridante diris: “Tio estas devo de ni popolaj policanoj.”

En la sekvanta tago Hju Guangjuan konstatis post enketado en la urba pilofarejo, ke antaŭ la Liberiĝo en ĝi estis laboristo nomata Ĝang Ĵong. Li estis maljuste eksigita el la pilofarejo pro bato al kapitalisto por savi infan-laboriston. Post la Liberiĝo li laboris en alia fabriko kaj nun jam emeritiĝis pro maljuneco.

Post kelkaj tagoj Hju trovis Ĝang Ĵong. La maljunulo kun emocio rememoris: “Mia tria frato mortis antaŭ longe kaj la tria bofratino ankoraŭ vivas. Ŝia filo perdiĝis antaŭ dekoj da jaroj kaj ĝis nun estas ankoraŭ nenia informo pri li.” Analizante pri tio Hju Guangjuan opiniis ke eble Ĝang Ĵong estas onklo de Ĝang Song. Li do diris al la maljunulo: “Estas elmigrinta ĉino nomata Ĝang Song. Li estis vendita al fremda lando antaŭ kvindek jaroj, kaj nun li revenis al la patrolando. Ĉu vi volas iri rigardi lin?”

“Bone!” Ĝang Ĵong kapjesis. “Estas pli bone, ke morgaŭ mi iros kune kun la tria bofratino kiu loĝas en Ĉangĝoŭdaŭ.” Hju Guangjuan tuj diris: “Morgaŭ mi akompanu

la geedzojn de Ĝang Song al Ĉangĝoŭdaŭ kaj tie ni intervidiĝu.”

En la sekvinta mateno Hju Guangjuan akompanis la geedzojn al Ĉangĝoŭdaŭ. De malproksime Ĝang Song vidis disflorantan bombakarbon, kiu tuj malfermis al li pensvojon. Li mire diris: “Ho jes, ĝuste sub tiu arbo mi almozpmetis.” Kaj ĉe la lotus-baseno nova brikdomo anstataŭis la antaŭan kabanon de lia familio.

Estro de la produkta taĉmento iris renkonte al ili. Hju Guangjuan klarigis al li la celon de ilia alveno. “Jen ĉi tie loĝas la tria avino,” diris la estro montrante la domon ĉe la lotus-baseno. “Hodiaŭ nia taĉmento okazigas sub la arbo kunvenon por kritiki kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio kaj ŝi parolos.”

Ili iris al la bombakarbo sub kiu sidis svarme multaj komunumanoj. Blankhara avino en nova vesto indigne akuzis la kontraŭrevoluciajn krimojn de Lin Biaŭ per sia familia historio plena de sango kaj larmoj. Antaŭ ŝi estis du ĉifonaj vestoj kaj unu eluzita bambua korbo kun difektita bovlo. Ŝi dolore diris: “Antaŭ la Liberiĝo mia edzo penlaboregis tutjare en kultivado kaj fiŝado por vivteni la familion, tamen ni ne povis kovri la farmopagon al bienuloj kaj la impostojn al fiŝtiranoj. Iutage li estis senindulge batita de bienulo pro tio ke li ne povis pagi terenton. Poste la bienulo ligis lin per ŝnuro kaj dronigis lin en riveron. De tiam mi fariĝis vidvino kaj devis ĉie almozpeti kun miaj infanoj. Post nelonge mi devis doni mian filinon al alia kiel infan-fianĉinon. Mia sep-jara filo Hihia estis trompe forportita ĉe drinkejo apud Vuĝoŭ-rivero. En la malvova socio al ni malriĉuloj ekzistis nenia vojo ol tiu de morto. . .”

Starante sub la bombakarbo, Ĝang Song aŭskultis la akuzon plenan de sango kaj larmoj kaj rigardis la bambuan korbon kaj la montratan bolvon — ĉu ili ne estas la objektoj uzitaj de li siatempe dum almozpetado! Kun larmoj li sin ĵetis en la homamason kaj alpaŝis al la maljuna patrino.

“Panjo. . .” li plorsingultis. Tio surprizis la maljunulinon. Kiam ŝi iom sin kvietigis, ŝi rimarkis cikatron sur la frunto de Ĝang Song — kiel konata estas la vizaĝo!

“Panjo, mi . . . mi estas Hihia.”

“Ĉu Hihia vi. . . vi estas?!” La neatendita renkontiĝo kun la filo ĝojigis la patrinojn ĝis larmoj, kaj ŝi karesante Ĝang Song diris: “Hihia, eĉ en sonĝo mi ne kuraĝis pensi pri revidiĝo kun vi!” Jen la renkontiĝo post longa disiĝo forte ĝojigis la patrinojn kaj la filon. Poste Ĝang Song kaj lia edzino intervidiĝis kun la onklo Ĝang Ĵong kaj la juna frato Ĝang Lin.

Ankaŭ Hju Guangjuan kaj aliaj ĉeestantoj kortuŝiĝis de tio ĝis larmoj. Hju iris al Ĝang Song kaj kore diris: “La malnova socio ruinigis vian familion, kaj en la nova socio vi trovis viajn parencojn post disiĝo dum dekoj da jaroj. La malsamaj socioj diferencas inter si ja kiel paradizo kaj infero.”

“Kamarado Hju, mi eĉ ne scias, kiel mi danku vin!”

“Vi devas danki Prezidanton Maŭ kaj la Komunistan Partion de Ĉinio!”

Jes, Ĝang Song tiam profunde sentis la varmecon de la patrolando kaj la feliĉon de la nova socio.

Pri la kuracaj pagoj de Ĉinio

EN Ĉinio la laboristoj kaj oficistoj de fabrikoj, minejoj, entreprenoj, laborantoj de ŝtataj institucioj, instruistoj, studentoj en superaj lernejoj kaj emeritoj ĝuas senpagan kuracadon. Krome, laŭ la leĝo la gefiloj kaj gepatroj de laboristoj kaj oficistoj de fabrikoj, minejoj kaj entreprenoj povas ĝui duonpagan kuracadon, kaj kiam la gefiloj aŭ senlaboraj familianoj de laborantoj de ŝtataj institucioj kaj lernejoj trafiĝis de grava malsano kaj la laborantoj ne povas pagi por la kuraco, ili povas ricevi konvenan subvencion de sia institucio aŭ lernejo laŭ ilia peto.

Plejparto de la produktaj brigadoj de la popolaj komunumoj en kamparo aplikas la sistemon de kooperativa kuracado. Nome, post kiam komunumanoj ĉiujare liveras ĉ. unu juanon kiel sian kontingenton de kooperativa kuracado,

ĉetero la komunumo disponigas helpe al la brigado certan sumon da mono el la komuna akumulo, ili ne bezonas pagi por kuracado.

Iu laboristino de Pekino suferis malvastiĝan perikardiiton. En la Ĉefurba Hospitalo ŝi loĝis sume 35 tagojn antaŭ kaj post parta perikardiectomy. La totala pago estis 190.21 juanoj (ĉ. 95 usonaj dolaroj). La pacientino pagis nur 35 juanojn kontraŭ manĝado dum loĝado en la hospitalo kaj 0.10 juanon por la registro. La ceteraj elspezoj estis pagitaj de ŝia fabriko, el la labora asekura fonduso: 5.10 juanoj por analizoj kaj ekzamenoj, 30 juanoj por la operacio, 44 juanoj por la transfuzita sango (400 mililitroj), 61.06 juanoj por la perfuzita glukozo, medikamentoj kontraŭinflamaj, paliativaj, anesteziakaj k.a., 9.80 juanoj por traktado kaj 5.25 juanoj por la aliaj.

Ĉiuj hospitaloj de Pekino postulas de ĉina paciento 0.10 juanon por registro, 0.40 juanon por sangsukera analizo, 1 juanon por analizo de hepata funkcio, 0.10-0.50 juanon por ĉiu fojo de diversaj fizikaj terapioj kaj 0.30 juanon por toraka X-radia ekzameno, maksimume 1 juanon por loĝado de unu tago en hospitalo, 5 juanojn por akuŝigo, 8 juanojn por apendicektomia operacio kaj 30 juanojn por komplikaj operacioj toraka kaj cerba. Analizoj de sango, urino kaj fekaĵo estas senpagaj.

Iu familiano de laboristo suferinta apendiciton estis kuracita en la Ĉefurba Hospitalo kvin tagojn kaj elspezis entute 29.03 juanojn por operacio, analizoj, fizika terapio, injektaĵo kaj medikamentoj.

Gripuloj pagas nur 0.74 juanon por diagnozo kaj medikamentoj.

La farmacia industrio de Ĉinio ne celas profiton. Dank' al prizorgo de la registaro al la popolo, ne nur la kuracaj pagoj estas malmultaj, sed ankaŭ la prezoj de medikamentoj estis plurfoje malaltigitaj grandskale. En okulfrapa kontrasto kun la mizera stato de la laboranta popolo en la malnova Ĉinio, la ĉina popolo sub la socialisma sistemo ne bezonas maltrankviliĝi pro kuraca pago.

Iu komunumano devenanta de malriĉkmparana familio en ĉirkaŭurbo de Pekino diris: "En la malnova socio mia patro malsaniĝis kaj iris en la urbon por viziti kuraciston, sed la hospitalo postulis ke ni trovu al ni firman garantiulon kaj antaŭpagu garantian monon por la kuraco. Pro tio nia sola peceto da tero estis vendita." Dum la regado de la kuomintang-a reaktiularo la komercistoj monopolantaj medikamentojn laŭvole altigis la prezojn de medikamentoj, kaj pri tio oni diris, ke "la oro estas prezohava, sed medikamentoj senprezaj". Tiam 10 ampoloj da penicilino de

200,000 unuoj kostis unu uncon da oro, en iuj lokoj eĉ unu ampolo jam kostis tiom da oro; 5 ampoloj da dihidrostreptomicino de miliono da unuoj kostis unu uncon da oro, en iuj lokoj eĉ unu ampolo kontraŭ 2 uncoj da oro. En la malnova Ĉinio, kiom da laboruloj kun larmoj rigardis siajn karulojn mortantaj en turmentado de malsanoj pro manko de mono por viziti kuracistojn kaj aĉeti medikamentojn.

Post la fondiĝo de la nova Ĉinio, antibiotikoj fariĝis ordinaraj kuraciloj por la vasta laboranta popolo kaj iliaj prezoj estis plurfoje malaltigitaj grandskale.

Nun la meznombraj prezoj de medikamentoj de Ĉinio reduktiĝis je 80% kompare kun tiuj en la komenco post la fondiĝo de la nova Ĉinio. La ŝtato abolis diferencojn de prezoj de malsamaj medikamentoj en malsamaj lokoj. Ĉu en urbo aŭ en kamparo, ĉu en la ĉefurbo Pekino aŭ en Tibeto, Hingiang, Hajnan-insulo aŭ aliaj malproksimegaj lokoj, la prezoj de samspecaj medikamentoj estas samaj.

Al la suferantoj de skistosomozo aŭ aliaj drastaj epidemioj la ŝtato donas senpagajn kuracadon kaj medikamentojn. Rilate naskoreguladon la ŝtato liveras senpagajn medikamentojn kaj ilojn kaj faras senpagan operacion.

Por protekti la sanon de la popolo, la nova Ĉinio fondis kaj disvolvas per siaj propraj fortoj la farmacian industrion. Post klopodo en 25 jaroj Ĉinio jam starigis firman bazon por farmacia industrio, kaj komplete ŝanĝis la postiĝintecon de la duonkolonia malnova Ĉinio, kiu dependis de importado de medikamentoj kaj farmaciaj drogoj. Nun Ĉinio jam povas plenumi la enlandan bezonon pri diversaj medikamentoj.

Heroaj gefiloj de Angkor

En sunbrila tago ni ascendis la plej altan etaĝon de la mondfama antikva Angkor-templo.

Angkor-templo estas fiero de Kamboĝo kaj simbolo de la kamboĝa nacio. De centoj da jaroj la sorto de la kamboĝa popolo strikte ligiĝas kun la templo. En la 18-a de marto de 1970 nigraj nuboj kovris Angkor — serioza nacia katastrofo falis sur Kamboĝon. En la mallumaj sufokaj tagoj la naciperfidula kliko de Lon Nol arogante svingis buĉistajn glavojn, kaj la agresa trupo de la usona imperiismo kaj

la pupa trupo de Sudvjjetnamio venis al Angkor kaj freneze faris tie bruligon, prirabadon kaj buĉadon. Sed la kamboĝaj popolanoj ne estis timigitaj de la aroganteco de la naciaj malamikoj. Unuiĝinte sub la standardo de la Nacia Unueca Fronto kun Norodom Sihanuk kiel prezidanto kaj la Reĝlanda Registaro de la Nacia Unuiĝo ili prenis pafilojn, sagojn kaj sarkilojn kaj faris sangan lukton kontraŭ la malamikoj. La flamanta popola milito rapide disvastiĝis tra la tuta lando. En la unua jaro de la milito la patriotaj arma-

Gardantoj de Angkor





Kulturi kaŭĉukarbidojn



Aluminiaj kaldronoj faritaj el faligitaj malamikaj aviadiloj

noj kaj popolanoj jam liberigis plejparton de la teritorio kaj loĝantaro kaj reprenis Angkor el sub la ungoj de la malamikoj.

En tiu granda naciliberiga milito la gefiloj de Angkor montris sian heroan sentimecon al perfortaĵoj kaj kuraĝecon en batalo. En la orienta regiono de Kamboĝo ni vizitis iun malgrandan vilaĝon. Kvankam ĝi havas nur 35 familiojn, tamen ĝi liveris al la revolucia trupo multajn eminentajn kadrojn kaj soldatojn, kaj nun ankoraŭ 60 el ĝiaj junuloj mi-

litservas. La grizhara vilaĝestro rakontis al ni: Antaŭ kelkaj jaroj iu trupo de la agre-santa sudvjetnama pupa armeo staradis en la ĉirkaŭaĵo de la vilaĝo. Pro timo kaj malamo al tiu revolucia vilaĝo, ĝi bombardis ĝin, kaptis homojn kaj batis virinojn en ĝi, devigante ilin doni siajn edzojn kiuj partoprenis en la revolucio, kaj devigis bonzojn grimpi sur arbojn por depreni kokosojn. . . Sed neniu el la pli ol 200 vilaĝanoj submetiĝis al la malamikoj spite al iliaj minaco kaj torturo, kaj en nokto ili tuj sin ĵetis en batalon. Tri el ili heroe oferis sian vivon en luktado. Ilia batalo daŭris tiamaniere ĝis kiam ĉiuj agresantoj estis forpelitaj. En Kamboĝo troviĝas ne unu sed miloj da tiaj vilaĝoj, kies popolanoj meminciate ekprenis pafilojn por batali kontraŭ la naciaj malamikoj.

En la granda malfacila lukto kontraŭ la naciaj malamikoj, la patriota spirito de la kamboĝa popolo disvolviĝis ĝis senprecedenca alteco, kaj aperis multaj herooj. Inter la kamboĝaj popolanoj cirkulas rakonto pri la nobla ago de juna heroino: En intensa batalo sur ŝoseo n-ro 6 kondukanta al Angkor ŝi sturmis en fronto ŝultroportante rakettubon. Raketoj pafiĝis unu post alia de ŝia ŝultro al la malamikoj. Kaj la indigno en ŝia brusto brulis kiel la ardaj raketoj. Kiam ŝi jam pafis 8 raketojn, ŝi ankoraŭ ne volis ripozi nek lasis aliajn ŝin anstataŭi . . . Ŝi pafis 18 raketojn en unu spiro. Granda nombro da malamikoj estis ekstermitaj, tamen ankaŭ ŝi falis pro grava vundo de skuado. . . Ĝuste tiel la filino de malriĉa kamparano, batalantino aliĝinta al la armeo antaŭ unu jaro oferis sian vivon por la patrolando. Ŝi estas nur unu el la miloj da popolaj herooj. Kaj sur la batalkampoj de Pnompeno aperis jenaj mitaj bravuloj: Post mallonga lernado kaj trejnado du junaj soldatoj, kiuj antaŭe neniam tuŝis kiras-aŭton, stiris antaŭen du peditajn raŭpkiras-aŭtojn, malgraŭ densa pafado kaj eksplodado de mangrenado, en la malamikan pozicion gardatan de granda nombro da malamikoj kaj frakasis du malamikajn fortikaĵojn. Kune kun la batalantoj en la aŭtoj ili pafmortigis kaj premmortigis sume pli ol 230 malamikojn,

tamen neniu el ili vundiĝis. Iliaj heroaĵoj jam fariĝis grandegaj spiritaj fortoj, kiuj kuraĝigis la kamboĝan popolon antaŭenmarŝi senĉese en la naciliberiga batalo.

En la granda naciliberiga milito ne nur laboristoj kaj kamparanoj brave leviĝis al batalo por savi la patrolandon, sed ankaŭ patriotaj intelektuloj sin ĵetis en la ardan batalon kaj faris valorajn kontribuojn por la granda afero de naciliberigo. En la vizito ni renkontis multajn tiajn intelektulojn, inter kiuj estas maljunaj specialistoj kiuj forlasis siajn komfortajn kondiĉojn de laboro kaj vivo, forlasis sian apudmaran vilaon kaj decideme iris al bataalkampo por servi al la naciliberiga milito per sia scio; kaj estas ankaŭ junaj lernantoj, kiuj ĉiamaniere sin liberigis el la katenoj de la kliko de Lon Nol, forlasis la lernejojn kaj iris en la liberigitajn regionojn por partopreni en la naciliberiga batalo.

Ĝuste tiel la kamboĝaj popolanoj, heroaj gefiloj de Angkor, marŝis de venko al venko en unuiĝa batalo, alte tenante la patriotisman standardon kaj timante nenian oferon.

En marto de 1975, kiam la popolaj batalantoj persistis en batalo por defendi Angkor, granda kampanjo disvolviĝis en Pnompeno. Ĝi estis lukto decidanta la sorton de Kamboĝo. En la fronto ĉiuj batalantoj siatempe estis bravuloj. La usonaj kanonoj en la manoj de la popola armeo indigne muĝadis kaj tankoj kaj kirasaŭtoj ĵus kaptitaj galopis sur la ba-

talkampo. Postfronte milionoj da popolanoj energie partoprenis en akvoutiliga konstruado kaj produktado de rizo. Sur ĉiuj ŝoseoj kaj vojetoj kaj riveroj grandaj kaj malgrandaj, bovĉaroj, bicikloj, aŭtoj, ŝipoj kaj boatoj plensarĝitaj per greno, legomoj, fruktoj, porkoj, kokoj k.a. rapidis al la fronto. Ĉio ĉi tio formis imponan bildon de popola milito, aŭgurante ke la granda historia antaŭenmarŝo de miloj kaj dekmiloj da heroaj popolanoj baldaŭ akiros grandan venkon.

Ĝuste en tiu momento iu supera komandanto de la Popolaj Armitaj Fortoj malfermis en sia komandejo militan mapon kaj fiere diris post momenta rigardo:

“Malgranda lando povas venki grandan landon, tio estas nia sperto!”

“La malamiko havas nek manĝaĵon nek popolon kaj al ĝi restas nur malmulte da tero; ĉiuj popolanoj staras ĉe nia flanko. Nia linio estas ĝusta, nia tero vasta kaj niaj ekonomiaj fortoj estas sufiĉaj kaj dank’ al tio ni povas batali cent jarojn!”

Kiel fortoplena estas la diro!

La senprecedence intensa batalo daŭris tri monatojn kaj 17 tagojn kaj fine la naciperfida kliko de Pnompeno komplete disfalis. La venka standardo hisigiĝis super Pnompeno kaj flirtas super la tuta teritorio de Kamboĝo. Jam komenciĝis nova erao de naciliberigo kaj nacirestarigo de Kamboĝo!

Batalantinoj sur la fronto de Angkor



Reviviĝis la rompita kruro de Branko

KAPTI ĈIUN MINUTON

Estis majo de 1974.

La haveno Kinhuangdaŭ apud la maro Bohaj baniĝas en sunbrilo. Senĉese venas kargoŝipoj de diversaj lokoj de la mondo en la havenon kunportante la amikecon de diverslandaj popoloj al la ĉina popolo. En la haveno iras intensa laboro kaj aŭdiĝas solena melodio de la kanto *Niaj Amikoj Troviĝas tra la Tuta Mondo*.

Sed okazis akcidento:

30 minutojn post la dua horo posttagmeze de la 9-a de majo, jugoslava kargoŝipo Mosa Pijade estis malŝarĝita kaj preta por foriri. Subite aŭdiĝis akra ekkrio en la ŝipo kaj juna maristo falis sangante. Li estis jugoslava maristo Branko Kalabric. Kiam li estis kovranta la duan holdon, pro lia malatento lia dekstra kruro estis tranĉrompita de la streĉata ŝtalkingo tiranta la holdkovrilon.

La vundo sangadis fonte. La vundito troviĝis en danĝero. Deĵorantoj de nia landlima kontrolejo tuj raportis tion al koncernaj instancoj. Kaj alrapidis dokistoj, oficistoj de la Proviza Kompanio de Kinhuangdaŭ por Fremdlandaj Ŝipoj kaj ambulanco de la havena hospitalo. Ili tuj sendis Brankon en la urban hospitalon de Kinghuangdaŭ.

Gvidantoj de la hospitalo tuj organizis savgrupon. La grupo faris necesajn aranĝojn: moderigi al la paciento la doloron, ĉesigi la sangadon, bandaĝi la vundon, splinti la rom-

pitajn ostojn, malaltigi la temperaturon de la gambo per glacisako, k.t.p.

Kuracistoj proponis tuj sendi la vunditon al Pekino por ke tie oni remetu al li la derompitan kruron.

Kinhuangdaŭ distancas de Pekino je kelkcent kilometroj. Por plej rapide porti la vunditon al Pekino, magistratanoj de Kinhuangdaŭ kaj respondeculoj de la Proviza Kompanio por Fremdlandaj Ŝipoj petis iun garnizontan aertrupon de nia mara armeo helpi per aviadilo.

Tempo ja signifis vivon. Informiĝinte pri la afero gvidantoj de la trupo tuj sendis aeroplanon kaj asignis la taskon al spertaj pilotoj. La preparo antaŭ ekflugo estis rapide farita.

10 minutojn post la 6-a, la aeroplano ekflugis kunportante Brankon. Por maksimume malakrigi la doloron al li kaj eviti sangadon de la vundo, piloto laŭeble malaltigis la aviadilon kaj moderigis la oblikvecon de flugado. La akompananta kuracisto estas kormalsanulo. Li sentis kapturniĝon, sed li neniam movis sian sensentiĝintan brakon alte tenantan la perfuzan botelon. La aeroplano glate surteriĝis. Atendantaj kuracistoj sur la aerodromo tuj sendis la vunditon per ambulanco en la Ĉefurban Hospitalon.

ATENTEMA KURACADO

Ricevinte urĝan sciigon en telefono, la dirita hospitalo jam okazigis urĝan kunvenon kaj

starigis specialan savgrupon, kaj ĝi ankaŭ petis Ĝiŝujtan-hospitalon helpi en kuracado.

En la operaciejo, laboratorio kaj sangokonservejo ekiris intensa preparado.

La vundo estis sufiĉe serioza. Preskaŭ tute derompiĝis la malsupra triono de la dekstra kruro. Kaj tiu parto ligiĝis al la stumpo nur per haŭto kun larĝo de 2.5 cm. kaj malmulte da subhaŭta histo. La vundo estis en loko kun relative malbona sangocirkulado. Cetere la derompitaj surfacoj de la vundita kruro estis tre malordaj. La frakturo estis multpeca, iuj ostopecetoj estis perditaj, la mola histo estis vundita kaj la vundo estis tre serioze malpurigita. Ĉio ĉi tio multe malfaciligis la operacion. Sed la ĉinaj kuracistoj decidis venki ĉiajn malfacilojn, rekunigi la rompitan kruron kaj konservi la originan longecon de la kruro por ke Branko povu daŭre labori post resaniĝo.

Operacio iris streĉe kaj glate. Subite okazis al la vundito grava transfuza reakcio, tra la tuta korpo aperis difuza erupcio kaj el la vundo multe eksudis sango. Por tuj forigi la transfuzan reakcion, preventi ŝokon kaj garantii glatan operaciadon, estis necese transfuzi freŝan sangon. Tiam oni tuj transfuzis al la pala Branko 3,300 mililitrojn da freŝa sango.

Sunradioj filtriĝis tra fenestra kurteno kaj falis sur la ridetantan vizaĝon de Branko. La kuracistoj, kiuj faris al li operacion kaj ne dormis en la tuta nokto, tiam ankoraŭ observadis apud li.

Post la operacio la ŝanĝiĝo de la sangocirkulado de la kruro kaŭzis al la paciento altan febron, erupcion kaj doloron en la talio. La kazo estis tre komplika. La savgrupo tuj konsultis en telefono al Ĉen Ĝongvej en Ŝanhajo kaj Kong Lingĝen en Tiangin, kiuj estas spertaj en rekunigo de rompitaĵoj membroj. Tiuj donis tre valorajn konsilojn en telefono kaj persone venis al Pekino en malpli ol 24 horoj. Ili partoprenis en kuracado kaj donis grandan helpon.

La kuracistoj kaj flegistoj prenis N. Bethune kiel ekzemplon kaj enkorpigis en ĉiu banala laboro la spiriton **“Savi mortantojn kaj helpi vunditojn por efektiviĝi revolucion humanisman”**.

Por akceli adheron de la vundo kaj preventi infekton al medolo, la kuracistoj aplikis al la vundo ĉinmedicinan medikamenton. Por plibonigi la sangocirkuladon de la kruro kaj akceli rekunigon de la rompitaĵoj, laŭ la ĉinmedicina kuracmetodo de frakturo “kombini moviĝon kun kuŝado”, ili aplikis splintadon, akupunkturadon, masaĝon, fizioterapiadon kaj gimnastikan terapiadon. Dum fizioterapio oni ne povis fari al la vundito determinadon de biologia dozo, la medicinistoj do faris tion sur sia korpo.

En unu jaro, la geflegistoj faris grandan klopodon por frue resanigi la jugoslavan mariston. Laŭkutime post la operacio oni devis mezuri temperaturon de piedfingroj pohore, sed flegistino Malgranda Ma faris tion poduonhore. Speciala flegisto Maljuna Meng tuttage flegadis Brankon. Maljuna Hiaŭ, laboranto de la ĉinmedicina apoteko ĉiumatene venis al la hospitalo je la tria horo por dekokti drogojn por li.

AMIKECO SENVELKA

Printempo refreŝigas kaj vigligas ĉion en la mondo. Kiam florbutonoj de siringo en Pekino estis elvolviĝontaj, la rompita kruro de Branko estis revivigita, la vundo tute adheris kaj ĉe la romploko aperis kaluso. Post irekzercado helpe de lambastonoj en tri monatoj, la sangocirkulado kaj funkciado de la kruro estis fundamente renormaligitaj.

Varmaj leteroj kaj telegramoj venis unu post alia de Jugoslavio al Pekino. La avino kaj patrino de Branko maltrankvile atendadis liajn informojn el la malproksima lando kaj lian baldaŭan revenon.

Kiam Branko estis vundita, lia patro Jerko Kalabric estis en Aŭstralio, sur oceana ŝipo. Ege maltrankviligis lin la vundo de Branko.



LERNEJOJ DE NUDPIEDAJ KURACISTOJ

Ĉiuj gubernioj de la provinco Henan fondis sian lernejon de nudpiedaj kuracistoj. Tiuj lernejoj nur akceptas nudpiedajn kuracistojn kiel lernantojn. La lernoperiodo estas unu jaro kaj post sia diplomiĝo la trejnitaj nudpiedaj kuracistoj revenas al sia brigado por daŭrigi sian servon. La estroj de tiaj lernejoj estas respondeculoj de la guberniaj burooj de publika sano kaj iliaj instruistoj estas kuracistoj de la guberniaj kaj komunumaj hospitaloj kaj spertaj nudpiedaj kuracistoj, apotekistoj kaj drogherbo-kultivistoj. Ankaŭ malriĉkamparanoj kaj malsuperaj

mezkamparanoj partoprenas en administrado de tiaj lernejoj.

La lernantoj komence lernas necesan teorion de medicino kaj poste sciojn pri ripetemaj malsanoj, precipe pri diagnozo, kuracado kaj preventado de malsanoj; pli poste direktate de instruistoj ili iras en kamparon por fari kuracadon, profilaktikan laboron kaj esploradon kaj kolektheadon de drogherboj. Ili lernas samtempe la okcidentan kaj ĉinan medicinajn, kaj krome ankaŭ kuracadon per popolaj receptoj. Post certa tempo de praktiko en kamparo ili revenas en la lernejon por daŭre lerni teorion. Ili faras tion plurfoje en unu jaro, tiel ili povas akiri ne nur teoriajn sciojn sed ankaŭ praktikan sperton.

La unuaj pli ol 20,000 lernantoj de tiuj lernejoj jam diplomiĝis kaj revenis al siaj produktaj brigadoj por fari sian kontribuon al plifirmigo kaj disvolvo de la kampara koopera kuracado.

Li volis tuj flugi al sia filo. Poste lia deziro plenumiĝis. Li venis al Pekino kaj vizitis la resaniĝantan filon. Forlasante Ĉinion, li esprimis, ke li volas servi sur la jugoslava-ĉina naviglinio por kontribui al disvolvado de la amikeco inter la jugoslava kaj ĉina popoloj.

Forpasis unu jaro, dum kiu Branko sopiregis sian Patrion. Sed kiam vere venis la tempo por hejmeniro, li tre bedaŭris la disiĝon. Li diris: "Mi rigardadis ĉiujn laborantojn de la hospitalo, por firme memori ilin."

En la lastaj kelkaj tagoj antaŭ sia forveturo, Branko volis viziti iujn lokojn por pli bone koni Ĉinion. En la maja Pekino, diversaj floroj komparas sian belecon en printempa zefiro. Branko ekskursis en la Somera Palaco de Pekino akompanate de kamaradoj de la Ĉina Ŝipagentejo kaj la Ĉefurba Hospitalo. Tie li fotiĝis kune kun la ĉinaj kamaradoj brakon en brako.

Antaŭ lia foriro la kuracistoj kaj flegistoj foje kaj refoje atentigis lin, ke li bone akomodu sin al kuracistoj en kuracado post reveno al sia lando kaj bone ekzercu iradon.

"Mia kruro estis rekunigita. Ĉio, kion vi faris, plifirmigos la amikecon de la jugoslava kaj ĉina popoloj." "Se ni faris ion utilan por vi kaj la ĉina-jugoslava amikeco, tio estas nia plenumenda internacia devo." Sincere respondis la ĉinaj kuracistoj. Ili varme deziris, ke Branko povu daŭre labori sur la naviglinio post nelonge.

Je la 23-a de majo, kamaradoj de la Ĉina Ŝipagentejo kaj la Ĉefurba Hospitalo eskortis Brankon al la aerodromo de Pekino. Starante sur la ŝtuparo, Branko laŭte kriis en la ĉina lingvo "ĝis revido", kiun li lernis en la hospitalo. La aviadilo sin pafis en la aeron. Branko ekveturis al sia Patrio kunportante profundan amikecon de la ĉina popolo al la jugoslava popolo.

Dana esperantistino en Pekino



Kiel membro de la Laborista Delegacio de Dana-Ĉina Amikeca Asocio vizitanta Ĉinion s-ino Herdis Knudsen, dana esperantistino, venis en la 14-a de julio 1975 al Pekino. Posttagmeze de la 17-a de julio ŝi vizitis la redakcion de *El Popola Ĉinio*. Tie la laborantoj de la re-

dakcio kaj la dana gasto ĝoje intervidiĝis kiel malnovaj amikoj. Ili interŝanĝis opiniojn pri ĉinaj esperantaj eldonaĵoj kaj s-ino Knudsen ankaŭ parolis pri sia impresoj pri sia vojaĝo al Ĉinio. En la sama vespero la redakcio aranĝis bankedon en ŝia honoro.

S-ro Fritz Mueller-Sorau, peranto de *El Popola Ĉinio* en Aŭstralio forpasis en la 13-a de junio de 1975. Ni esprimas nian koran funebron pro lia forpaso. En la pasintaj 18 jaroj li persiste kaj

energie laboris kiel nia peranto kaj per tio faris kontribuon al interkompreniĝo kaj amikeco inter la popoloj kaj esperantistoj de Ĉinio kaj Aŭstralio.

La redakcio de EPC



La molaŭ-oj

de ZONG MIN

Molaŭ-nacieco kun ĉ. 50,000 membroj estas unu el la ĉinaj nacimalplimultoj kun longa historio.

La molaŭ-oj havas sian propran parolan lingvon, sed ne skriban. Ili apartenas al la hana-tibeta lingvosistemo. Pro longtempa kunvivado kun han-oj kaj ĝuang-oj k.a. frataj nacioj la plejparto de ili scipovas paroli la han-an kaj ĝuang-an lingvojn, kaj ankaŭ konas la skriban han-lingvon.


Pli ol 90% de la molaŭ-oj loĝas en Luoĉeng-gubernio de la Guanghi-a Ĝuang-a Aŭtonoma Regiono, dum la ceteraj dise en la gubernioj Jiŝan kaj Liuĉeng kaj la Du-an-a Jaŭ-a Aŭtonoma Gubernio en ĝia ĉirkaŭaĵo.

En la periodo de la dinastioj Tang kaj Song (700-1,300 p.K.) la molaŭ-a regiono jam eniris en feŭdan socion kaj tie relative frue disvolviĝis la agrikultura ekonomio. Sed en la lasta periodo de la feŭda socio de Ĉinio stagnis la ekonomio.

Pro la kruela ekspluatado kaj subpremado fare de la reakciaj regantoj kaj lokaj bienuloj al la vasta kampanaro en ĉiuj dinastioj, kaj oftaj katastrofoj de sekegeco, inundo kaj fiinsektoj, la molaŭ-a popolo vivis tre mizere.

Post la Opia Milito en 1840, kun la senĉesa profundiĝo kaj plivastiĝo de la agresado fare de imperiismaj potencoj, ankaŭ la molaŭ-a regiono, nedisigebla parto de nia patrolando, fariĝis iom post iom duonkolonia kaj duonfeŭda socio. En vintro de 1944, la japanaj agresantoj invadis Luoĉeng-gubernion kaj faris masakradon, perfortaĵojn kaj prirabadon ĉie en ĝi. Tiam la molaŭ-oj dronis en ankoraŭ pli mizera abismo.

Kie estas subpremo, tie estas kontraŭstaro. Por oponi kontraŭ la neeltenebla malluma regado kaj barbara prirabado de imperiismo, feŭdismo kaj burokrata kapitalismo la molaŭ-oj multfoje faris armajn ribelojn kaj bataladis senĉese. En la periodo de la kampanara revo-



lucio de la Tajping-a Ĉiela Regno, multaj molaŭ-oj aktive aliĝis al la Tajping-a Armeo, kaj firme batalis kontraŭ reakciaj regantoj de King-dinastio. Post la fondiĝo de la Komunista Partio de Ĉinio, precipe en 1930, kiam la Sepa Armeo de la Laborista-Kampanara Ruĝa Armeo, gvidata de la Komunista Partio de Ĉinio, preterpasis Luoĉeng, Tianhe k.a. guberniojn en molaŭ-a regiono en sia nordenmarŝo por rezisti kontraŭ la japanaj agresantoj, iuj molaŭ-oj preparis teon kaj manĝaĵojn por la armeanoj kaj aliaj servis kiel voĵgvidantoj por ili aŭ rekte partoprenis en batalo kune kun ili. Dum la Kontraŭjapana Rezistmilito, kiam la japanaj agresantoj faris invadon al Guanghi, molaŭ-oj aliĝis al la Liubej-a Kontraŭjapana Sturma Taĉmento gvidata de la Partio. Ili heroe batalis kaj donis fortajn batojn al la malamikoj. En 1946 en la periodo de la Liberiga Milito, sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio multaj molaŭ-oj establis sekretajn revoluciajn organizojn por opo-

ni kontraŭ rekrutigo, rekvizicio de greno kaj impostado de la reakcia registaro de Kuomintang kaj batali kontraŭ pagigo de terrento kaj per tio frakasis la subpremado de la kuomintangaj reakciuloj. En 1938, multaj molaŭ-aj gejunuloj partoprenis en la Liubej-a Popola Liberiga Kolono kaj faris heroan arman batalon kontraŭ malamiko, kaj fine liberigis sian hejmlokon kune kun la Ĉina Popola Liberiga Armeo suden marŝanta.

La molaŭ-oj okupas sin ĉefe pri kulturado de rizo, maizo, batato, sojfabo, tritiko, arakido, kotono, tabako k.a. La nivelo de disvolvigo de ilia agrikulturo fundamente egalas al tiu de la proksimaj regionoj de han-oj kaj ĝuang-oj. Antaŭ la Liberiĝo en tiu regiono la bienuloj kaj kulakoj okupis plejparton de la kampoj. Ekzemple en Mamen-vilaĝo de Luoĉeng-gubernio, la 4 bienulaj familioj okupis pli ol 40% de la agro kaj pli ol 54% de la brutoj kaj agrikulturiloj, dum la 11 familioj de malriĉaj kamparanoj okupis nur 11% de la agro kaj 9% de la brutoj kaj agrikulturiloj. Pro la kruela ekspluatado de la bienula klaso kaj la malluma regado de la kuomintangaj reakciuloj, la kampara ekonomio en la molaŭ-a regiono tiutempe pli kaj pli depresiĝis, la areo de agro senĉese reduktiĝis, grandiĝis la areo de dezertaj kampoj, kaj la totala kaj pomua produktokvanto de la ĉefaj plantaĵoj malgrandiĝis iom post iom.

La flankokupoj havas gravan lokon en la ekonomia vivo de la molaŭ-oj. En la favoraj naturaj kondiĉoj de montregiono kaj duonmontregiono, ili faras multflankajn entreprenojn, kiel kolektadon de lokaj produktaĵoj, bredadon de brutoj, plektadon de bambuaj instrumentoj, elfosadon de karbo, preparadon de lignokarbo, plektadon de pajlsandalo k.a. Ili okupiĝas ankaŭ pri forĝado de diversaj agrikulturiloj, produktado de fajencaĵoj, ŝpinado, teksado, ĉarpentado kaj kudrado. De pli ol 100 jaroj molaŭ-oj sin okupas pri farado de fajencaĵoj, kaj la sablopotoj produktitaj de ili estas malpezaj kaj malkaraj.

La molaŭ-a kostumo havas klaran nacian karakterizaĵon. Molaŭ-aj virinoj povas fari

belajn jupejn kun delikataj desegnaĵoj broditaj per nigraj kaj blankaj kotonfadenoj sur la ligrimenoj kaj retforma punto ĉe la rando. Iliaj ornamaĵoj estas orelingoj, fingroringoj kaj braceletoj el arĝento.

En decembro de 1949, Guanghi estis liberigita. Je la 1-a de januaro de 1950, la popola registaro de Luoĉeng-gubernio estis fondita kaj poste fondiĝis ankaŭ la popola reĝimo en diversaj niveloj sub ĝi. Gvidate de la Partio kaj la popola registaro, molaŭ-oj venke kondukis agraran reformon, likvidis la feŭdan ekspluatatan sistemon kaj frakasis sian spiritan katenon kune kun ĝuang-oj kaj han-oj. Puŝate de la alta tajdo de agrikultura kooperigo molaŭ-aj popolanoj sin organizis, en 1955, en elementan agrikulturan produktan kooperativon kaj faris socialisman reformadon al la metia produktado. En la jaro 1958, la Centra Komitato de la Partio publikigis la ĝeneralan linion "streĉi plene la energion kaj strebi forte antaŭen por konstrui socialismon multe, rapide, bone kaj ekonomie". Sub la brilo de tiu linio la molaŭ-aj popolanoj levis ardan tajdon de impeta produktado en industrio kaj agrikulturo, kune kun alinaciecaj popolanoj de nia lando, kaj efektivigis popolkomunumigon en nelonga tempo.

Samtempe kun disvolvo de la agrikultura produkto, molaŭ-aj popolanoj energie faris fundamentajn konstruadojn de akvoutiligo en servo al terkulturo, precipe de post la komenco de la Granda Proleta Kultura Revolucio, oni konstruis plurajn akvokonservejojn kaj instalas turbinajn pumpilojn, dank' al kio oni turnis tieajn sekajn kampojn en irigaciajn kampojn kaj multe altigis la produktokvanton de greno per durikoltigo de la unurikoltaj kampoj. Nun, en tiu regiono la pomua produktokvanto de greno pliiĝis de 50-100 kg. antaŭ la Liberiĝo ĝis pli ol 500 kg.

Antaŭ la Liberiĝo, en la molaŭ-regiono estis nenia moderna industrio. En la periodo de la jaro 1958 ĝis 1973, Luoĉeng-gubernio jam starigis, laŭ nekompleta statistiko, 18 malgrandajn fabrikojn de agrikulturaj maŝinoj, kemia sterko, cemento k.a. kaj unu karbomine-



Porkbreda avino

(Kantakonto de Pudong*)

Verkita de la Literatura Grupo de Gong-
lu-komunumo de Ĉuanŝa-gubernio, Ŝanhajo

Ĉiuj: (Kantas)

*Ni tinte frapas la latunajn pecojn de
cimbaloj,*

*kaj nun rakontos de sur modesta scenejo.
En Lugiabang de l'antaŭurbo de Ŝanhajo
sin trovas iu ege avangarda porkbredejo.
Sukcesojn ĝi atingis brile en porkbredado,
ke varme ĝin laŭdegas ĉiuj kun estimo.*

*Kiuj laboras do en ĝi pri bredado de porke-
toj?
— ja estas la gepar' de porkbreda avino.*

A: (Kantas)

*L'avino sesdekjara havas klaran menson
kaj kiel steloj brilas al ŝi la okuloj.
Kuraĝas ŝi en diroj, agoj kaj en penso,*

jon. La nombro de la malgrandaj fabrikoj starigitaj de la komunumoj kaj brigadoj atingis 165. Koncerne al trafikado, 80 procentoj de la brigadoj en la tuta gubernio jam havas ŝoseon kun totala longeco de 470 kilometroj.

Ankaŭ sufiĉe rapide disvolviĝis la aferoj de kulturo kaj edukado de tiu loko. Antaŭ la

Liberiĝo en Luoĉeng-gubernio troviĝis nur 2 mezlernejoj kaj kelkaj elementaj lernejoj, nur 30% de la lernaĝaj geknaboj povis viziti lernejojn. Nun tiu gubernio havas 12 mezlernejojn kaj pli ol 600 elementajn lernejojn kaj 95% de la lernaĝaj geknaboj povas viziti lernejojn.

*kaj amas ridi kaj paroli kiel viklecaj
junuloj.*

B: (Kantas)

*Lu Ahiang, estro de l' bredejo,
estas ja ŝia vivkunulo-maljunulo,
kiun kromnomas oni per Obstina Bovo,
ĉar lin abunde dotis per spitemo la Na-
turo.*

Ĉiuj: (Kantas)

*Kverel' okazis unu tagon inter la geduo,
la pacan porkbredejon regis granda bruo.*

D kaj E: (Kantas)

*Ektondris jam la voĉ', rondiĝis la okuloj,
Kaj la vizaĝ' ruĝiĝis al la maljunulo.*

C kaj Ĉ: (Kantas)

*Sencede la avino kontraŭargumentis
kaj pinto-kontraŭ-pinte forte sin defen-
dis.*

A kaj B: (Kantas)

*Riproĉoj kaj refutoj inter-konkurencis:
tute videble la disputo —*

Ĉiuj: (Kantas)

tre intensis.

D: (Klarigas) *La geavoj ĉiam kunvivis tre
harmonie. Kial do ili disputas hodiaŭ?*

A: (Klarigas) *Ĉar la avino lastatempe ko-
mencis novan eksperimenton por kres-
kigi porkon ĝis la grandeco de elefanto
en zoo. Ŝi diris al la junaj porkbre-
distinoj Hiaŭling kaj Afang: (Kantas)*

*Por la revolucio ni kreskigu grandajn
porkojn
kiuj pli multe donos sterkon por riĉigi
l' grenrikolton.*

C, Ĉ, D kaj E: (Kantas)

*Por trovi novan vojon de porkbre-
do,
penis
l' avino en eksperimento spite mal-
facilojn.*

*La kadroj kaj komunumanoj ĉiuj ŝin
subtenis
kaj ofte al ŝi venis kun helpemo kaj kon-
siloj.*

*Veninte hejmen de vojaĝo faris tuj ri-
proĉon*

*la maljunul' abrupte tondrigante sian
voĉon.*

B: (Kantas)

*Ĉiuj porkidoj grasis, kiam hejmon mi
forlasis,
veture al Ĝegiang pro iu tasko.
Skeletojn ili havas nur — nun monato
forpasis —
tiaj porkaĉoj en modelbredej' — kia
fiasko!*

A: (Kantas)

*Forgesu vi l' titolon de model' de por-
kobre-
do,
antaŭen turnu la okulojn por novan ri-
medon
eltrovi. Ja necesas rompi kun malnova
rutino,
por porkojn pligrasigi supernorme en la
fino.*

B: (Kantas)

*Kian valoron havas via senbaza parolo.
Por daŭre havi grasajn porkojn kun
certa sukceso,
pruvitan sperton oni devas teni en
memoro.*

A: (Kantas)

*Kvankam sukcesojn ni atingis en la
pasinteco,
por konservativismo tamen vi ne devas
ple-
di.
Al ni necesas daŭre provi por malkovri
leĝojn
de porkkreskigo kaj pligrasajn porkojn
multe bredi.*

B: (Kantas)

*Se daŭran provon volas vi virin' frivola,
tiam fuŝajon respondecu vi mem sola.*

A: (Kantas)

*La pens' de Prezidanto Maŭ direktas
miajn farojn;
neniuj malfaciloj formos por mi iajn
barojn.
Por la revoluci' mi riskos rompi mian
kolon,*

- ĉar, kvankam aĝa, tamen restas al mi
ŝtala volo.*
- D:** (*Klarigas*) Vidante ke la maljuna paro disputas arde, la junaj porkbredistinoj Hiaŭling kaj Afang ne povas sin reteni, kaj Afang tuj intervenas.
- Ĉ:** (*Kantas*)
*He, onklo Ahiang, ĉu vi portas nomon
Ŝafo?
Pro kio timas vi jen tigron jen lupon sen
ia bravo?
Por breĉi grasajn porkojn ni bezonas
iniciatemon.
Ĉu timo povas helpi en solvado de l'
problemo?!*
- C:** (*Kantas*)
*Hiaŭling eĉ pli malpacience kaj impete,
kiel mitralo pafis vortojn torente kaj
salve:
"Malnovaj pensoj ideismaj kaptas vin
obsede,
ke al novaĵoj vi vin tenas glacie mal-
varme.*
- B:** Kio? (*Kantas*)
*Ne ludu vi voĉkordon nek svingadu vian
langon,
pri teori' mi ne povas atingi vian rangon.
Se dank' al viaj penoj vi ekhavis porkojn
elefantajn,
mi garantias ke mi havos porkojn balen-
grandajn.*
- A:** Maljunulo, kion do ni faru, laŭ via opinio?
- B:** Kion fari? Ni dividu inter ni la porkojn en apartajn stalojn.
- C, Ĉ, D kaj E:** Ah! Ĉu breĉi aparte?
- B:** (*Kantas*)
*Provadon renovigan faru vi laŭ via volo,
kaj mi bredadu miajn porkojn laŭ mia
rutino.
Porkojn grasigas ja ne sonoraj paroloj,
ni vidu, kiun la rezult' pravigas en la
fino!
Vi breĉu porkojn en la orienta stalo kaj
mi en la okcidenta.*
- C:** Tiel estu, avino, breĉi aparte, des pli bone!
- A:** Ne, Hiaŭling. (*Kantas*)
*Pensis en si l' avin' pri farota kontrakto:
La maljunulon ree kaptas nun lia obstino.
Ni rompu lian rutinemon per konkreta
fakto.
Bone, maljunulo, vi zorgu la porkojn en
la okcidenta stalo dum mi tiujn en la
orienta. Sed tio ĉi ne signifas dispartigon.*
- B:** Kion alian do?
- A:** Revolucian konkurson.
- B:** Bone, do konkurson laŭ via volo!
- A:** Sed kun unu kondiĉo.
- B:** Kio plu?
- A:** "Unue amikeco, due konkurso".
- B:** Tio . . . bone, tiel estu!
- A kaj B:** (*Kantas*)
Ĉar inter la maljuna par' okazis kontraŭdiro,
- Ĉiuj:** (*Kantas*)
jen la konkurs' revolucia estis en ekiro.
- A:** (*Kvajban-e**)
*Novvojon la avin' ekserĉis el la tuta
koro,
kaj la porkidojn zorge traktis ŝi kiel trezoron.
Akvolaktukojn** ŝi kolektis el la lago
orienta
kaj akvajn arakidojn** el la lago
okcidenta,
krom tio ankaŭ amarantojn kaj batatajn
tigojn.
Kaj per ĉi ĉio porkojn nutris ŝi post fermentigo.
Miksitan kun la krudaj, donis ŝi nutraĵon
grenan;
da gren' do ŝi sukcesis ŝpari tri vazegojn
plenajn.*
- B:** (*Kantas*)
*Vidante la magrecon kaj ostecon de l'
porkidoj,*

en sia koro la maljuna Ahiang sentis
brulon,
grenon li donis tuj por vekaj ties apetiton.
Nutri po 4-5-foje tage fariĝis regulo.
Deziris li, ke ili tuj fariĝu jam balenoj,
semajn' apenaŭ pasis, jam for tri vazojn
da greno.

Ĉ: La montoj havas krutaĵojn kaj la vojoj
kavojn. Pasis iom da tempo kaj la avino
renkontis novan problemon.

E: Kian problemon?

F: Jen — (Kvajban-e)

Iutagmeze dum manĝdono
enstale la porkidojn ŝi kontrolis:
Makula Ventro lace malstreĉigas sian
lumbon.

E: (Kvajban-e)

Granda Orelo kuŝas kaj nenion volas.

D: (Kvajban-e)

Longa Talio vagas zigzage kun stumbloj.

C: (Kvajban-e)

Orelojn svingas Longa Kruro kun kap-
skuo.

kvazaŭ ĝi dirus:

Ĉiuj: (Kvajban-e)

“Mankas al mi apetito, kaj kia enuo!”
Perdiĝis nun al la avin' dormem' kaj
apetito,
tutage en la stalo ŝi gardadis la por-
kidojn.

A: He! (Kantas)

Subite la avin' rimarkis strangan fenome-
non:

Kelkaj porkidoj kalkon mordetas ĉe
murangulo
kaj krake ili maĉas kaj englutas kun
plezuro,
kvazaŭ bombonojn maĉus la infanoj
kun frandemo.

Vidinte tion la avino komencis cerbumi.
Pro kio ili volas tion ekgustumi?
Kaŭzon sendube havas tiu ilia deziro.
Alvoku tuj mi ĉiujn por interkonsilo.

B: (Kantas)

Vidinte tion avo Ahiang flamis de kolero.
Ke l' porkoj evidente mordas muron pro
malsato,
ĉu vi ankoraŭ dubas pri l' afero?
ĉu ilin ne turmentas ĝuste malsufiĉ' de
nutro?
aŭ restas al vi tute ne plu eĉ spertero?

A: Sed, maljunulo, ĉu vi ne lernis ĵus
hieraŭ en la Vespera Politika Kurso, ke
“**Kiam ni rigardas iun aferon, ni devas
ekzameni ĝian esencon,**” kiel Prezidanto
Maŭ instruis al ni?

Ĉ: Bonege vi memoras, avino.

A: La porkoj mordas muron. Kio estas la
esenco en tio?

B: Esenco, esenco, la esenco estas ke ili
volas manĝi.

A: Manĝi? Kion do?

B: Kion? Grenon, kion vi domaĝas kaj ne
volas doni al ili!

A: Grenon? Ne tion, ŝajnas al mi, mal-
junulo.

B: (Flanken) Vidu, la porkoj tiel malsatas,
ke ili ekmordas kalkon, kaj tamen la
maljunulino ankoraŭ ne volas tion kom-
preni kvazaŭ perdinta la saĝon!

A: (Pripensante) Se akvo mankas en la
korpo, soifon sentas la buŝo. Kio do
mankas al ili, ke ili frandas kalkon? Hej,
maljunulo! (Kantas)

Ĉu nia nep' kalci-tablojdojn
ne manĝas ekde kelkaj tagoj?

B: (Kantas)

Ne decas ke melono sin ekvolvu cepon,
kian rilaton havas viaj porkoj kun la
nepo?

Ke la infano prenas kalciajnablojdojn,
tio necesas por kreskigi fortike la ostojn.

A: Prave, maljunulo! (Kantas)

Fortikajn ostojn devas havi ankaŭ la
porkidoj,

*tial ekmordas ili kalkon de la mur' kun
apetito,
simile kiel la infanoj tre plezure
maĉadas la kalciajn tablojdojn susure.*

A: (Kantas)

*Kalcitablojdoj kaj kalcitablojdoj, ĉesu
vi kun via kanto!*

*Da ili vi eĉ donu tutan tunon
viaj porkidoj ne kreskegos kiel elefantoj!
(Klarigas) Maljuna Ahiang kolere
svingis la manon kaj foriris.*

C: Avino, vi pravas. La porkidoj bezonas kalcion por kreskigi la ostojn, tial ili mordas la muron.

Ĉ: Avino, el la libro *Porkbredado* mi legis, ke al kalcimankaj porkoj oni devas doni pulvoron de osto aŭ konko.

C: Avino, mi iru por aĉeti tion.

A: Ne necesas.

C: Kial ne?

A: Nu, venu kun mi, Hiaŭling kaj Afang.

Ĉiuj: (Kvajban-e)

*Rapidis ili nudpiede al rivera bordo
ĉar tie ja troviĝis bezonata la trezoro:*

D: Mitulaj ŝeloj,

E: ostr-kiraso,

C: etaj kraboj,

Ĉ: litorinoj,

Ĉiuj: kaj plie river-anodontoj,

C kaj Ĉ:

ĉiuj riĉas je kalcio,

D kaj E:

*estas facile akireblaj kaj kostas al ni
neniom.*

A: Kaj la porkidoj manĝis ilin kun kontento

kaj kantis grunt-grunt-grunte

Ĉiuj: (Kantas)

por esprimi sian agrablsenton.

A: Vidante ke sukcesis la provo, la avino tre ĝojis en la koro. Post kelkaj monatoj

ŝi demandis maljunan Ahiang: "Hej, maljunulo, hieraŭ mi vidis vin pesi la porkojn. Kiom ili kreskis lastmonate?"

B: Hm, ne por imponi vin, ili kreskis meznombre pli ol 20 kilogramojn. Kaj vi kiel porkbredisto, mi vidas, ankaŭ zorgas pri akvoproduktoj. Nu, kiel fartas viaj porkoj?

A: Ne malbone. Hieraŭ mi mezuris ilin per mezurbendo. Ili kreskis je 1.2 futoj, en unu monato.

B: Kia absurdo kaj ridindeco. Mi vivis jam pli ol 60 jarojn, ankoraŭ neniam vidis ke oni mezuras porkojn per mezurbendo anstataŭ pesilo. Maljunulino, tio estas vere nova iniciato je via flanko! Sed por kio taŭgas tiaj porkoj nur kun skeleto simila al kukum-stabloj, se al ili kreskas nur ostoj anstataŭ karno?

A: Ho, maljunulo, la ostoj ja signifas karnon.

B: La ostoj signifas karnon?

A: Jes, 1 kilogramo da osto portas 20 kilogramojn da karno!

B: Nu, bone. Sed, diru al mi, kial hodiaŭ vi ne aĉetis ostojn anstataŭ viando por fari pasteĉojn? Kian absurdaĵon vi kapblas elpensi.

A: Maljunulo.

(Kantas)

*Ĉiuj aferoj estas dividitaj en du,
kaj oni ne nur fenomenojn eksterajn
atentu.*

*Inter la karn' kaj l' osto estas ja rilato,
kies dialektikon klare vi konstatu.*

B: (Kantas)

*Teoriumi ĉiam scias vi kiel giganto.
Se nur elbredos vi per ostkreskigo gra-
sajn porkojn
respekte mi kliniĝos antaŭ vi kiel me-
tilernanto.*

Ĉiuj: (Kantas)

*Kelkaj monatoj pasis for en palpebrumo,
okazis grandaj ŝanĝoj al la du pork-
grupoj.*

C kaj Ĉ: (Kvajban-e)

La porkoj de l' avin' kun longa korp' kaj
altaj kruroj
havis skeletojn grandajn taŭgajn por
surporti karnon.

Jam venis tempo por grasigi per intensa
nutro

kiam ekpezis ili pli ol kvindek kilo-
gramojn.

La porkoj nun ricevis grenon en abundo,
kaj ĝin manĝegis 4-5-foje tage kun
grandamo.

Pajlo sterniĝis dike en la stalo sur la
grundo
formante kvazaŭ puran, varman kusenon
surlitan.

Krome la fermentinta nutro tre ekscitis
apetiton,

bonguste l' porkoj manĝis kaj komforte,
ĝue dormis.

Rapide ili grasiĝadis tagnocte senĉese,
simile al fermenta pasto ŝvelanta kons-
tante.

Unu monato pasis, oni ekmezuris ilin
pese.

Kaj jen tri ĝinoj estas taga plipezig'
pezkvante!

D kaj B: (Kvajban-e)

Nun venis vico al maljuna la Obstina
Bovo.

Li ĉagreniĝis lastatempe kun sulkitaj
brovoj,

ĉar pro malgrando de l' skeletoj de la
porkoj liaj,

mankis al ili lokoj por surporti karnon
plian.

La pez' de l' porkoj ĝis cent kilogramoj
maksimumis,

kvankam jam multan grenon ili forkon-
sumis.

Ne eblis pligrasigi ilin jam tre korpul-
lentajn

kiel superi bovon korpe por ran' sen-
prudenta.

Kun ventroj tertuŝantaj ili rampiris sin-
trene

antaŭen, kvazaŭ pilkegoj ruliĝus hezi-
teme.

Necesis help' eĉ kiam ili iris por manĝ-
preno,

kaj Ahiang devis ofte ŝviti en subten'
kun peno.

B: (Kvajban-e)

Apenaŭ unun mi starigis, jam alia ree
falas,

kaj pro penado vana miaj haroj hirte
staris.

Porkaĉoj malprudentaj, estas stultaj vi
bestaĉoj,

mi volas fari vin gigantoj, (Kantas)
sed vi preferas resti mizerajoj!

C: Onklo Ahiang, la porkoj de la avino jam
kreskis kiel elefantoj en zoo.

C, Ĉ, D kaj E: Kiam viaj balenoj transnaĝos
maron?

B: For, for, tuj for! (Ĉiuj ekridas.)

Tamen, mi vere volas iri por rigardi la
porkojn de la maljunulino.

A: Nu, maljunulo, estu bonvena kaj faru
kritikojn pri mia laboro.

B: Estas tro granda honoro por mi, tro
granda honoro! (Kantas)

La grandaj porkoj tute min konsternas
vere!

Ili similas elefantojn — diru mi sincere.

La dorsoj larĝas kiel pordflugiloj,
l' oreloj kvazaŭ palmfoliaj ventumiloj.

Kredeble, pli ol sepcent ĝinojn ĉiu porko
pezas.

Duoble pli ol miaj — honte mi konfesas.
Maljunulin' vi havas vere apartan saga-
con!

Se mi antaŭe havis pli da sperto ol vi,
en la konkurs' vi venkis min jam per via
aŭdaco.

A: (Kantas)

Parolu vi ne pri sagaco aŭ pri saĝo,
ja plej plej grava estas la praktiko kun
kuraĝo.

Vi novan rezonadon subjektive malak-
ceptas

kaj ĉion novan antaŭjuĝe, obstine sus-
pektas.
Eraris ĉefe vi en apogo sur spert' mal-
nova,
kaj memkontente volas resti en stagno
senmova.
La tuta land' nun pene lernas de la
Daĝaj-anoj,
ni devas sekvi ilin paŝo post paŝo prok-
sime.
Revolucion faru ni en staloj per la pro-
praj manoj,
antaŭen marŝu, maljunulo, brave kaj
senfine.

B: Maljunulino, tre tre prave vi diris!

C, Ĉ, D kaj E: Do onklo Ahiang vi devas riverenci nun antaŭ via majstro!

B: Jes, jes, mi tion devas fari!

A: Aj, maljunulo, tio ne konvenas inter ni maljuna paro. Decas ke ni lernu unu de la alia kaj kune marŝu antaŭen!

Ĉiuj: (Kantas)

*De porkbredejo ni rigardas malproksi-
men:
revoluciaj perspektivoj etendiĝas ja sen-
lime.*

*Senĉese novajn kontribuojn faru ni
fervore
por montri nian amon al la ruĝa sun'
elkore.*

* Kantrakonto de Pudong estas unu el la multaj specoj de lokaj buŝaj artprezentaĵoj en Ĉinio, kiuj portas la ĝeneralan nomon *ĉuji-o*. Tiu ĉi speco de *ĉuji-o* el la antaŭurba distrikto Pudong de Ŝanhajo jam havas historion de pli ol cent jaroj. Ĝi konsistas ĉefe el kantoj kun dialogoj laŭ bezono. Dum prezentado de kantrakonto de Pudong, oni akompanas la kantadon per frapo de malgranda cimbalpeco per bambua bastoneto kaj ne mankas ankaŭ gestado. Ĝia formo estas viveca kaj riĉa je folkloro koloro. La melodioj de ĝiaj kantoj kun klaraj taktoj estas simplaj kaj facile lerneblaj. En tiu artformo oni nun klopodas muldi figurojn de proletaj herooj. Konservante kaj disvolvante ĝian karakterizaĵon, oni uzas en ĝi ankaŭ iajn esprimrimedojn de dramludo kaj *kvajban-o*, kiu estas alia speco de *ĉuji-o* el deklamado de versoj rapidritmaj laŭ la fortaj taktoj de klakiloj el diversaj materioj. Antaŭe la kantrakonto de Pudong estis prezentata de sola persono, sed nun de pluraj ludantoj. Ĉio tio donis al ĝi novan fizionomion.

** Akvolaktuko (*Pistia stratiotes*) kaj akva arakido (*Alternanthera philoxeroides*) estas verdaj akvoplantoj uzeblaj kiel manĝaĵoj por porkoj.



PENTRAĴOJ DE LABORISTOJ EN RONDIRA EKSPUZADO




Ekspozicio de Pentraĵoj de Ŝanhajaj, Jangkjuan-aj kaj Ljuda-aj Laboristoj estis okazigita en Pekino lastjare kaj poste sin montris en la urboj Nanĉang, Gujlin, Ĉangŝa, Hi-an, Taj-juan kaj aliaj urboj.

Nun ĝi montriĝas en diversaj lokoj de Nordorienta Ĉinio kaj estas tre bonvena al la rigardantoj.

La ekspozataj 171 verkoj inkluzive de ĉinstilaj pentraĵoj, olepentraĵoj, gravuraĵoj, rakontaj bildserioj, propagandaj pentraĵoj, novjaraj bildoj kaj guaŝoj estas zorgeme faritaj de laboristaj belartaj amatoroj de Ŝanhajo, Jankjuan kaj Ljuda, sub direktado de la revolucia literatura kaj arta linio de Prezidanto Maŭ Zedong. Tiu ekspozicio plene montris, ke la ĉina laborista klaso estas kreanto ne nur de materia riĉaĵo sed ankaŭ de spirita riĉaĵo, kaj mastro de la socialisma kulturo.

Dum rikoltado de tritiko

de Guoliang



Sur la kovrilo:

Mezlernejanino lernas kultivadon en kamparo.

EL POPOLA ĈINIO 中國新道

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO
P.O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

Ĝenerala distribuanto: Guozi Shudian (Centro de Ĉinaj
Eldonaĵoj), P.O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio

N-ro 9 (206) 1975

Ĉefa Enhavo

Pri funkciado de lernejo kun malfermita pordo	1
Eksterlerneja edukado al geknaboj	5
Infanoj verkas novajn infankantojn	9
Vizito al regiono plagita de tertremo	13
Por la nobla idealo	21
Kultivado de bonaj specioj	27
Serĉado de parencoj	31
Pri la kuracaj pagoj de Ĉinio	33
Heroaj gefiloj de Angkor	35
Reviviĝis la rompita kruro de Branko	38
La molaŭ-oj	42
Porkbreda avino (kantrakonto de Pudong)	44



Riĉa rikolto de tritiko kaj kolzosemo sur la ebenaĵo de okcidenta Siĉuan



La vasta kamparo sur la ebenaĵo de okcidenta Siĉuan de Ĉinio akiris someran riĉan rikolton de greno ĉijare. La foto montras, ke komunumanoj de Hindu-gubernio falĉas tritikon per malgrandaj kombajnoj.



Komunumanoj de Hongse-brigado en la antaŭurbo de Ĉengdu ventumas la rikoltitajn kolzosemojn.

Sinsekvaj riĉaj rikoltoj de brutobredado

La brutobredado de la unuiginta flago (gubernio) Darhan Mumingan de la ligo Ulanĉab en Interna Mongolio multe disvolviĝis post la Liberiĝo. La totala brutaro bredata ĉijare estas kvinoblo de tiu en la komenca periodo post la Liberiĝo.

Darhan Mumingan situas en izolita loko, kie vivas pli ol 87,000 homoj de mongola, hana, huja, manĉura kaj aliaj sep naciecoj. Antaŭ la Liberiĝo, tie multaj grandaj sekaj stepoj ne estis ekspluatitaj. Post la Liberiĝo, sub la direktado de la naciaj politikoj de la Partio, la diversnaciecaj kadroj kaj paŝtistoj, sin apogante sur la kolektiva ekonomio, reformis la stepon jaron post jaro. Ili starigis tie bazojn de fojno, boris putojn, fosis irigaciajn kanalojn, konstruis akvorezervejojn kaj pligrandigis la irigaciatan areon, tiel ke la brutobredado de tiu ĉi flago akiris sukcesojn en la lastaj sep sinsekvaj jaroj.



Laj Hongde (la dua de maldekstre), kamparano kaj kultivisto de bonspeciaj plantoj de Hindu-gubernio observas la kreskadon de kolzo de bona specio kune kun sciencesplo-raj grupanoj sub sia gvido.

Kamelaro de la flago





Dank' al konstruado akvoutiliga, la paŝtejo akvomanka en la pasinteco fariĝis akvoriĉa, kaj la brutoj sane kreskas.


Ĝangzi-insulo en la Flava Maro

Sur la bela kaj riĉa Ĝangzi-insulo en la senlima Flava Maro estas Ĝangzi-popolkomunumo de Ĉanghaj-gubernio, Liaŭning-provinco.

La komunumo okupiĝas ĉefe pri fiŝado. En profunda disvolvo de la amasa movado de "lerno de Daĝaj en agrikulturo", ĝi rapidigis la paŝojn en mekanikigo de sia fiŝkaptado. Nun ĉiuj fiŝipoj grandaj kaj malgrandaj estas motorigitaj. Kaj samtempe ĝi forte disvolvis ankaŭ sian agrikulturan kaj flank-okupan produktadon, pligrandigis la agran areon je pli ol 400 muoj. La produktokvanto de greno de la insulo altiĝas jaron post jaro kaj tiu de legomoj jam sufiĉas por ĝia konsumado. En 1974 la totala produktokvanto de akvoproduktaĵoj kaj komuna akumulo de la popolkomunumo pli-ol-tri-obligis kompare kun tiuj antaŭ la kultura revolucio. Nun prospereco regas la tutan insulon.

La fiŝipo "la 8-a de Marto" veturis pli ol 300,000 marmejlojn dum pli ol dek jaroj kaj fariĝis avangarda unuo en nia akvoprodukta fronto. Jen la junulinoj de la fiŝipo





Nova transformatorejo

Gangzi-popolkomunumo




Dank' al uzo de pluraj specoj de fiŝkaptiloj leviĝis la kvanto de kaptitaj fiŝoj.



Fiŝŝiparo de la komunumo al fiŝkaptado



Liupan-montaro



Liupan-montaro

Liupan-montaro situas en la suda parto de la Ninghia-a Huja Aŭtonoma Regiono de Ĉinio, kie trapasis la Laborista-Kampanara Ruĝa Armeo vidata de la granda gvidanto de la ĉina popolo Prezidanto Maŭ Zedong ratempe dum La Longa Marŝo. La ĉefa pinto de la montaro altas pli ol 800 metrojn super la marnivelo kaj ricevis la nomon Liupan pro tio ke ni devas ĉirkaŭiri ses zigzagojn laŭ malfacila vojo por atingi ĝian pinton.

Antaŭ la Liberigo dezerteco regis la lokon. Post la Liberigo rapide ŝanĝiĝis ĝia fizionomio. Dank' al monthakado por konstrui kampojn kaj kvoutiligado fare de la vasta amaso de malriĉkamaranoj kaj malsuperaj rezkamaranoj, multe disvolviĝis tie la agrikulturo. Nun la totala produktokvanto de greno de la montregiono konsistigas trionon de tiu de la ŝtata regiono. La riĉfontojn en granda abundeco utiligas kaj ekspluatas nun la ŝtato laŭplane.


En la lastaj jaroj, la trafiko en la montregiono rapide disvolviĝis kaj longeco de la nunaj ŝoseoj estas sesoblo de tiu antaŭ la Liberigo. Aŭtoj povas rekte atingi ĉiujn guberniojn de la montregiono kaj 95 procentoj de la komunumoj havas ŝoseojn, kio konformiĝas al la bezono de disvolviĝo de industrio, agrikulturo kaj transportado.

Nova ŝosea ponto



Sur la dorskovrilo:
Daĝaj-tipaj kampoj ĉe la
piedo de Liupan-montaro

Transformatorejo ĉe la
piedo de Liupan-montaro



Meteostacio sur la
pinto de la montaro



